

Rüdiger Eichholz [†]

Dekunu Paroladetoj pri Pekoteko

Teksto-kajero US\$ 4.00
2 kasedoj US\$ 6.00
Sendkostoj US\$ 2.50

Mendu ĉe:
R.Eichholz, Esperanto Press,
Bailieboro, Ontario, KOL 1B0
Kanado, Tel.: (705) 939-6088

Ankaŭ en Kanado la registaro devas barakti kontraŭ granda deficito. Tial ĝi ne plu subtenas Kanadajn eldonistojn per pli favora libro-tarifo. La send-kostoj por 3 kilograma pakaĵo (por la 3 volumoj de Plena Pekoteko 1985-1990) nun estas depende de la landoj per marpoŝto:

US\$ 8.15 (por Usono)

US\$ 16.70 (por la plej multaj okcident-Eŭropaj landoj, kaj por Pollando, Rumanio, Singaporo, Japanio, Sud-Koreio)

US\$ 21.20 (por Britio, Bulgario, Ĉeĥio, por la plej multaj landoj de Afriko, Aŭstralio, Novzelando, Kubo, Meksikio, Venezuelo)

US\$ 26.60 (por Italio, Ĉinio, Hindio, Irano, Irako, Srilanko, Brazilo, Argentino)

US\$ 33.90 (landoj de iama Sovetunio, Bangladeŝo, Nord-Koreio, Vietnamio).

Tamen nuntempe mi ankoraŭ povas sendi al ĉiuj landoj pakaĵojn sub 2 kg por US\$9.60 kaj sub 1 kg por US\$6.80. La tri volumojn de "Plena Pekoteko 1985-1990" mi tial ekspedas en du pakaĵoj.

Kvakam la sendkostoj ege altiĝis mi pretas sendi donace ankoraŭ 10 personoj loĝantaj en landoj, el kiuj oni ne povas ĝiri monon, la tri volumojn de "Plena Pekoteko 1985-1990" kune kun respondiloj, se tiuj promesas kunlaboron en la Pekoteko-projekto, kaj se ili povas pruvi per alsendo de manuskriptoj, ke ili jam laboris sur la terminara kampo. Aliaj devus peti korespond-amikon, ke tiu pagu la volumojn kaj sendkostojn por ili.

Antaŭparolo

La instigon por prepari tiujn paroladetojn pri la Pekoteko-sistemo mi dankas al s-ro Pettyn de la Pola Radio, kiu pretis "amplekse popularigi" mian laboron, kaj petis min magnetofone registri taŭgajn tekstojn, kiujn li povus elsendi.

Mi provis verki la paroladetojn tiel, ke ili estas kompreneblaj ankaŭ por Esperantistoj, kiuj nenion komprenas pri komputado kaj kiuj ankoraŭ ne okupiĝis pri terminaraj laboroj. Tamen, por la plej multaj Esperantistoj la temoj estas tiel malkutimaj, ke ili ne multe profitos de unufoja aŭdado en radio. Tial estus bone, se la samaj paroladetoj povus servi ankaŭ kiel diskutbazo dum kunvenoj de lokaj Esperanto-grupoj. Tial mi preparis magnetofonajn registraĵojn kun teksto-kajero, por ke kunveno-gvidantoj povu facile respondi demandojn de aŭdintoj. Krome pere de presitaj tekstoj mi povas doni ekzemplojn de konkretaj Pekoteko-registraĵoj, kiuj pli bone komprenigos la sistemon ol nura paroladetoj pri Pekoteko.

Celo estas montri, kiel komputoroj faciligas interkomunikadon, kiujn metodojn ni kapablas apliki por pliriĉigi nian lingvon, kiuj problemoj ekzistas, kaj instigi al diskuto pri diversaj eblecoj por solvi ilin. Se ni observas la hodiaŭan mondon, ni vidas terurajn sekvojn de modernaj teknikaj rimedoj. Tamen dependas de ni, kiel ni utiligas ilin. Por Esperanto la tekniko provizas tute novajn eblecojn por informi pri nia lingvo, por instrui ĝin kaj por instigi aliajn homojn lerni ĝin. Necesas, ke ni konatiĝu kun tiuj eblecoj, ke ni pripensu, kiel plej efike apliki ilin, kaj ke ni fine ekagu.

Ne mankas temoj, kiujn mi povus en simila maniero trakti, se oni petos tion. En la lastaj paroladetoj mi raportas pri la unuaj reagoj ricevataj al dissenditaj volumoj de "Plena Pekoteko 1985-1990". Depende de la ricevotaj reagoj mi iam ajn povus aldoni pliajn paroladetojn.

1993-06-10

Rüdiger Eichholz

Kio estas la trivoluma Pekoteko?

Pekoteko estas akronima mallongigo por "Perkomputora Termino-Kolekto". Mi uzas tiun vorton por nomi la termino-kolektaĵon, do la rezulton de termino-kolektado. Sed Pekoteko servas ankaŭ kiel nomo por nova labor-procedo por evoluigi nian lingvon laŭ precize preskribita efika vojo, kiun modernaj komputoroj ebligas.

Vi volis scii, kio estas la ĵus aperinta trivoluma Pekoteko. Ĝin mi nomis "Plena Pekoteko 1985-1990", ĉar ĝi estas kolektaĵo de ĉiuj inter 1985 ĝis 1990 ekregistritaj nocio-kompleksoj. Kial mi diris "nocio-kompleksoj" kaj ne simple "terminoj"? -- Ŝajnas al mi necese klarigi tion iom pli detale: Nocio estas laŭ internacia normverko "Pens-unuo formiĝinta per abstraktado eliranta de komunaj proprecoj de objektaro" <93/005>*.

PIV diras pli mallonge: "Nocio estas abstrakta, klare difinebla ideo". Parenca nocio estas "koncepto", en PIV difinita per: "Abstrakta kaj ĝenerala ideo". La terminon "koncepto" oni aplikas en Esperanto kaj en la Franca al iom pli kompleksaj pens-elementoj ol nocioj, ĉar temas pri pens-elementoj, kiujn la homoj ne akiris kvazaŭdenaske kiel la nociojn de lumo, de varmo, de tago aŭ nokto, sed temas pri pens-elementoj kreitaj de homoj dum ilia evoluo. Oni ekz-e parolas pri la koncepto de tempo, de spaco, de ŝtato aŭ de justeco; sed oni ne parolus pri koncepto de simpla objekto, ekz-e pri koncepto de ŝtono, tranĉilo aŭ martelo. Oni povus paroli pri la koncepto de komputoro. En tiu ĉi kazo oni pensus pri la multaj ideoj kaj pensoj, kiujn homoj evoluigis por realigi tiun aparaton. Same oni povus paroli pri la nocio de komputoro. En tiu ĉi kazo oni provus difini la esencon de tiu ĉi ilo. Oni dirus, ke temas pri aparato pro trakti informojn ... ktp.

Tio signifas, en Esperanto, la Franca kaj la Germana ni distingas - almenaŭ subkonscie - inter "koncepto" kaj "nocio". En la Angla oni ne faras tion, ĉar en tiu lingvo la termino

notion havas precize la malan signifon de nocio, nome laŭ <Rand>: "Ĝenerala, **malklara** aŭ neperfekta koncepto aŭ ideo." Jen bona ekzemplo por pravigi la postulon, ke oni traduku nociojn aŭ konceptojn sed ne vortojn aŭ terminojn. Tial Pekoteko baziĝas sur nocio-kompleksoj kaj ne sur vortoj aŭ terminoj. Vortoj kaj terminoj estas la nomoj de nocioj aŭ konceptoj. Vortoj estas komunlingvaj nomoj por nocioj aŭ konceptoj; terminoj estas iliaj faklingvaj nomoj.

En pintaj krampoj <...> troviĝas en Pekoteko font-indikoj, kiuj montras Pekoteko-kompleksojn. <93/005> ekzemple indikas la 5-an Pekoteko-kompleksojn el la jaro 1993. Aliaj fontindikaj mallongigoj estas klarigitaj ekde paĝo 613 en la unua volumo de PP85-90.

En Plena Pekoteko 1985-1990 troviĝas 8 500 nocio-kompleksoj, kiuj enhavas iom pli ol 10 000 Esperantajn terminojn. Nocio-komplekso, kiu estas la registraĵo, kies temo estas unu nocio, estas la baza unuo en la kolektaĵo. Ĝi enhavas la klasifan numeron de la Universala Decimale Klasifiko (UDoKo), per kiu la nocio estas atribuita al precize difinita fako; ĝi enhavas Esperantajn kaj etnolingvajn terminojn, kiuj nomas la koncernan nocion; ĝi enhavas difinojn por la nocio, kaj rimarkigojn pri la terminoj kaj difinoj.

Fakterminaro laŭ internacia norm-verko konsistas el sistema aranĝo de nocio-kompleksoj, en kiu la kompleksoj estas laŭteme ordigitaj. Ankaŭ alfabete ordigitajn terminolistojn en unu aŭ diversaj lingvoj oni nomas terminaro. Tamen tiuspecaj terminaroj aŭ pli ĝenerale vortaroj ofte ne estas fidindaj, ĉar simile aspektantaj terminoj povas havi malsamajn signifojn en diversaj lingvoj. Mi ĵus klarigis, kial la Angla *notion* ne estas tradukebla per "nocio".

Ankaŭ la Angla termino *computer* nomas multajn tre diversajn aparatojn, al kiuj ni devus atribui minimume du diversajn radikojn: komput' kaj komputor'.

Kelkaj redaktoroj aroĝis al si la rajton misnomi Pekotekon "Perkomputila termino-

kolekto", ĉar ili opiniis distingon inter komputilo kaj komputoro superflua. Ĵus faris tion la redaktoro de "Eventoj" (en la unua numero de majo 1993). Ŝajnas al mi tial necese atentigi denove pri la diferenco inter komputilo kaj komputoro.

Computer en la Angla estas iu ajn aparato por trakti informojn laŭ precize preskribitaj reguloj. La termino tial indikas ĝeneralan nocion, kiun oni aplikas en la Angla al tre diversaj aparatoj. Tio povus esti aparato por kalkuli kaj mezuri la ĝustan kvanton da benzino ŝprucotan en motoron; ĝi povus esti aparato por determini la tempon, dum kiu lavomaŝino funkcias; ĝi povus troviĝi en malmultekosta diĝita horloĝo aŭ ĝi povus esti komplikega aparato en mislo por stiri ĝin al iu trafota celo. Por tiu ĉi tre ĝenerala nocio ni povus utiligi la terminon "komputilo". Sed tiu ĉi vorto estas, kiel la sufikso -il/ indikas, derivita vorto. Ni devus nepre difini ankaŭ la bazan nocion la agon aŭ la verbon, de kiu komputilo estas derivita. Kiel ni difinu ĝin?

to compute en la Angla estas sinomino por *to calculate*, por tiu nocio ni uzas en Esperanto "kalkuli". Ne utilis "komputi" kiel sinonimo "kalkuli". Sed ekzistas la pli ĝenerala moderna nocio de inform-traktado (*information processing*) aŭ data-traktado (*data processing*), por kiu ni bezonas Esperantan terminon. Tiun nocion mi rekomendas nomi "komput-ado". Ĝin ISO, la Internacia Organizo por Normigado, difinis jene (mia traduko): *La sistema traktado de dataoj. Ekzemploj: per-mana traktado, mergado, ordigado, kalkulado, asemblado, kompilumado. RIMARKIGO: komputado povas esti plenumata per homoj aŭ aŭtomataj rimedoj. La lasta procedo estas ofte nomata: "aŭtomata data-traktado".*

Se ni akceptus tiun difinon, tiam "komputi" fariĝus multe pli ĝenerala termino ol "kalkuli" -- kalkulado ja estas menciita kiel unu ekzemplo de komputado. Sekve de tio ankaŭ ĉiu "kalkulilo" (ekz-e abako aŭ glit-kalkulilo) fariĝus speco de komputilo.

Krome ni bezonas terminon por la en la difino menciita "aŭtomata data-traktado", tiun specialan tipon de komputado mi rekomendas nomi "komputorado", kaj la aparaton, kiu estas bezonata por aŭtomate trakti dataojn, ni nomu "komputoro".

""Komputi" oni povas kun aŭ sen komputilo kiel jenaj ekzemploj montras: Oni povas en la kapo kalkuli iun rezulton; sed oni povas tiucele ankaŭ utiligi iun kalkulmaŝinon kaj eĉ komputoron; oni povas komputi la nombron da vortoj en iu teksto, per tio ke oni nombras ilin unu post la alia, aŭ oni povas transdoni la taskon de nombrado al komputoro. Oni povas alfabete ordigi la vortojn de tiu teksto per tio, ke oni skribas la vortojn sur slipetoj kaj poste ordigos tiujn slipetojn, aŭ oni povas transdoni la taskon de ordigado al komputoro. Se mi faras ĉion tion mi "komputas" aŭ pli fakece: "mi produktas dataojn prilaborante aliajn dataojn laŭ algoritmo." Por plenumi tiuspecan laboron oni hodiaŭ kutime uzas aparaton, kiu aŭtomate traktas dataojn. Se mi faras tion, mi utiligas komputoron, mi komputoras. ""Komputori" oni povas nur kun helpo de komputoro, same kiel oni povas aŭtomobili nur kun helpo de aŭtomobilo.

Se mi verkas la artikolon, kiun vi nun aŭdas aŭ legas kun helpo de mia komputoro, tiam mi ne "komputas", ĉar tio signifas, ke mi traktas dataojn por ricevi aliajn dataojn! Tion mia komputoro faras por mi! Tial verkante la artikolon mi estis komputoranta.

Nur se ni disponas pri ambaŭ radikoj, ni povas klare distingi inter:

- komputanto = persono okupiĝanta pri komputado
- komputisto = profesia komputanto aŭ programisto
- komputoranto = persono manipulanta komputoron
- komputoristo = profesia komputormanipulanto

Lerni komputadon estas io tute alia ol lerni komputoradon!

Venontfoje ni paroli iom pli pri tiu mirinda aparato, la komputoro.

La komputoro

Komputoro enhavas diversajn enigilojn por meti informojn en ĝian "cerbon". Tio povas esti **1-e:** Klavaro aŭ "muso", por ke komputoranto povu enmeti la informojn. **2-e:** Iuspeca drajvo, en kiu "kapo" kapablas "legi" magnetigitajn diskojn aŭ bendojn, aŭ **3-e:** Iu modemo por akcepti informojn senditajn de fora komputora sistemo per telefonaj lineoj aŭ sendrate.

Krome komputoro enhavas eligilojn por utiligi la eligotajn informojn, post kiam la komputora cerbo prilaboris ilin. Tio povas esti **1-e:** ekrano por vidigi elektronike registritajn tekston aŭ bildon. **2-e:** Iuspeca drajvo kun kapo por registri la eligitajn informojn, por ke ili konserviĝu kaj estu utiligeblaj, kiam bezonataj. **3-e:** Iu modemo por sendi la eligitajn informojn al fora komputora sistemo aŭ per telefonaj lineoj aŭ sendrate.

Ni vidis, ke la Angla termino *Computer* servas por indiki tre malsamspecajn simplajn ilojn aŭ komplikegajn aparatojn. La ĝenerala ilo, la komputilo, povas servi por tre diversaj celoj kaj ĝia prezo povas varii inter kelkaj cendoj kaj milionoj da dolaroj. Ankaŭ inter la pli special-celaj oficejoj kaj personaj komputoroj povas ekzisti grandaj diferencoj, ili povas esti firme instalitaj aŭ facile portebblaj sur manplato. Kelkaj servas kiel elektronikaj skribmaŝinoj kun memoro por faciligi la klavadon de ripetotaj tekstoj. Aliaj povas, depende de aparte aĉeteblaj programoj, plenumi tre malsamajn taskojn, ekzemple ili povas faciligi korespondadon kaj elektronike dissendi mesaĝojn. Ili povas fari inĝenierajn desegnojn, plenumi komplikajn librotajn taskojn, ili povas voĉlegi registritajn tekstojn, aŭ sur paperfolioj skribitajn tekstojn aŭ presitajn tekstojn en libroj. Ili povas reagi al voĉaj ordonoj, kaj povas determini la

identecon de persono, kies voĉo estis registrita. Ankaŭ la prezo-diferencoj inter komputoroj kaj komputoraj programoj estas tre grandaj depende de iliaj kapabloj.

Sed la esenca diferenco inter komputilo kaj komputoro estas nek prezoj, nek komplikeco nek rapideco de funkciado, sed la fakto ke komputilo plenumas sian laboron kutime sen homa interveno. (Tamen ekzistas ankaŭ primitivaj komputiloj, kiuj bezonas homan funkciiganton, ekz-e: abako, glitkalkulilo, kalkul-maŝinoj). Komputoro bezonas homan funkciiganton por enmeti dataojn kaj programojn, por ke ĝi povu aŭtomate trakti dataojn, kaj homon por legi kaj utiligi la rezultojn de la komputora laboro.

Nur komputoroj taŭgas por faciligi terminaran laboron. Feliĉe la prezoj de tiuj helpiloj falegis dum la lastaj jaroj. Samkapablaj komputoroj, kiuj antaŭ dek jaroj devis esti firme instalitaj en apartaj ĉambroj, kaj kiuj kostis centmilojn da dolaroj, nun estas lokigeblaj sur skribotablo kaj kostas dumil ĝis kvinmil dolarojn. La por terminaraj laboroj taŭgaj aparatoj, kiuj iam kostis pli ol dekmil dolarojn, nun estas haveblaj jam por 500 dolaroj. Krome la komputoroj fariĝis pli "uzant-amikaj", ili fariĝis pli facile utiligeblaj kaj povas pli rapide trakti multe pli grandan kvanton da informoj. Tial komputoroj estas ĉiam pli vaste utiligataj tutmonde.

Konstatinte la novajn eblecojn, kiujn komputoroj povus kontribui al terminaraj laboroj, mi ellaboris planon, kiel Esperantistoj povus utiligi tiun "elektronikan sklavon" por laŭplane evoluigi nian lingvon, per sistemo, kiu ebligas al multaj personoj egalrajte partopreni la terminaran laboron. Tial mi ellaboris la Pekoteko-sistemon.

La strukturo de Pekoteko

Por trovi tradukon por iu ajn termino, ni devas unue difini la nocion de la alcelita objekto. Nur post tio oni provu proponi ekvivalentan Esperantan terminon. Kiel ekzemplon mi menciis la Anglan terminon *computer*, por kiu mi rekomendas du malsamajn terminojn "komputilo" kaj "komputoro". La lasta estas pere de klavaro aŭ muso manipulebla speco de "komputilo". Bedaŭrinde oni ofte ne distingas inter ambaŭ nocioj - ĉar en la Angla oni ne faris tiun distingon - kaj tial dum jaroj senfrukta diskutado okazis, kaj eĉ hodiaŭ kelkaj homoj ne volas agnoski, la gravan diferencon inter la nocioj de komputilo kaj komputoro.

Mi diris en antaŭa prelegeto, ke Pekoteko estas unuflanke kolektaĵo de terminoj, kiuj baziĝas sur nocioj, kaj ke aliflanke ĝi estas labor-metodo, kiu ebligas la egalrajtan kunlaboron de multaj diverslokaj Esperantistoj por kompili terminarojn. Tial Pekoteko estas io tute alia ol multlingva vortaro.

Komence de ĉiu nocio-komplekso troviĝas la UDoKo-numero, la numero de la Universala Decimala Klasifiko por precize indiki la fakon, al kiu la koncerna nocio apartenas. Per la UDoKo-numeroj la nocio-kompleksoj estos aŭtomate ordigeblaj laŭtute. Post ordigo ni facile rimarkos, se iu nocio-komplekso ne estis ĝuste klasifita, nome, se ĝi troviĝas en la sama klaso kiel tute alispecaj aliaj terminoj.

Poste sekvas Esperantaj kaj etnolingvaj terminoj uzataj (aŭ nur proponitaj) por la koncerna nocio. Post ĉiu termino kaj difino troviĝas referencilo*, kiu indikas pere de la font-indika kampo en ĉiu nocio-komplekso la proponinton de iu termino aŭ difino. Referencilo ankaŭ indikas el kiu verko la termino estis ĉerpita, aŭ kiu verko estis la bazo por iu difino. Tiuj informoj gravas, se iu kritikis ion en nocio-komplekso, ĉar per tiuj informoj oni daŭre scias, kio estis da bazo por iu difino, aŭ kiu proponis iun terminon.

Krom la font-indika kampo troviĝas en ĉiu nocio-komplekso ankaŭ rimarkigo-kampo. Tie ĉiu povas registri iujn rimarkigojn pri terminoj aŭ difinoj. Oni povas tie indiki, kial iu termino ne ŝajnas esti bona, kiel oni devus korekti iun difinon ktp. Al ĉiuj en la kompleksoj donitaj informoj legantoj reagu.

En ordinara vortaro ne ekzistus spaco por ĉiuj tiuj aferoj. Sed en elektron-ikaj registraĵoj ni povas esti pli malŝparemaj rilate al spaco. Ni povas aldoni multajn pliajn informojn ol estus ekonomie en presita libro. Tamen por ke la tekstoj restu superrigardeblaj kaj aŭtomate senerare trakteblaj, -- tio ja estas unu el la plej gravaj avantaĝoj de elektronika registraĵo -- gravas, ke ili estu registritaj ĉiam precize same. Tion garantias aplikado de makrooj (tio estas registritaj sinsekvoj de klavofrapoj, kies ripetadon oni povas ordoni). Tiuj makrooj aŭtomate kreas la kadrojn por faciligi la registradon de la tekstoj. Makrooj helpas por eviti erarajn klavofrapojn. Ekzemple post ĉiu lingvo-identigilo -- ĝi servas por identigi la lingvon de termino -- devus troviĝi kodaĵo por tabel-spacaĵo kaj ne kodaĵoj por du aŭ tri spacetoj. Sur normala ekrano aŭ en la presita libro oni ne vidus diferencon, ambaŭ kodaĵ-specoj aspektas kiel malplenaj spacoj. Sed aŭtomata eligo de terminoj ne funkcias, se anstataŭ tab-kodaĵoj troviĝus kodaĵoj por spacetoj post la lingvo-identigiloj.

Kvankam Pekoteko 85-90 aperis en presita formo, en tri volumoj kun 1816 paĝoj, ĝi estas nur provizoraĵo por montri al Esperantistoj, kiuj ne disponas pri komputoro, kiuj terminoj jam estas registritaj elektronike, kiel oni difinu novajn terminojn, kiel la tuta verko estas aranĝita kaj praktike utiligebla, kiel diskuto okazas, kaj kiel estas esplorita la opinio de Esperantistoj. Per studado de miloj da difinoj kaj terminoj oni plej bone lernas, kiel oni verku difinojn, kiel oni kreu terminojn, kaj kiel oni argumentu por aŭ kontraŭ iuj solvoj. Mi esperas, ke tio stimulos multajn lingvo-aktivulojn okupiĝi pri la en tiu verko traktitaj lingvaj detaloj. Plena Pekoteko eble ankaŭ

instigos al aĉeto de komputoro, por ke pli da Esperantistoj povu rekte kunlabori. Sed kompreneble ĉiu skribe rajtas komuniki siajn ideojn pri iu ajn el la multaj temoj pritraktataj en tiu verko. Mi poste parolos pri kelkaj temoj, kiujn ni ĝis nun ne unuece traktas.

Plena Pekoteko 85-90 estas provizoraĵo, ĉar probable pro reago de legantoj pliaj komentoj, terminoj kaj difino-rekomendoj estos aldonataj, tial la presitaj libroj baldaŭ fariĝos malaktualaj. Tamen estas utile posedi la volumojn, ĉar ili estas konsulteblaj sen eliri el prilaborata dosiero, se oni deziras legi iujn instrukciojn, pri registrado de terminoj, aŭ se oni volas ekscii, ĉu iuj terminoj jam estis registritaj, aŭ se oni volas trovi iujn Pekoteko-numerojn. Ĉiu kunlaboranto nun povas facile ekscii, kio jam estas registrita. Tiel ni evitas, ke oni proponas malsamajn terminojn por samaj nocioj. Krome la volumoj estos interesaj por kompari la nunan staton de nia lingvo kun la stato post eble dudek jaroj. Plena Pekoteko liveras interesan materialon por scienca esploro de la evolu-tendencoj en nia lingvo.

La verko kostas US\$ 80.00. Tio ŝajnas esti alta prezo. Sed se oni dividas la 80 dolarojn per la nombro de paĝoj en la verko (kune kun la du respondiloj temas pri 1952 paĝoj!), tiam la prezo estas nur iomete pli ol 4 cendoj por dense surprisita paĝo en la formato A5. Je tiu ĉi prezo oni povus hodiaŭ aĉeti neniujn novajn eldonaĵojn. Mi kapablis eldoni la verkegon en presita formo nur pro subvencio fare de la FAME-fondaĵo.

La registraĵoj de Plena Pekoteko 85-90 estas haveblaj ankaŭ en elektronika formo sur 5-kaj-kvaron-colaj aŭ sur 3-kaj-duon-colaj moldiskoj. En tiu formo (sur 20 aŭ sur 10 diskaj) la tuta verko estas havebla por 40 dolaroj. Avantaĝoj de la elektronikaj versioj estas, ke ili estas la plej aktualaj, ĉar tempo pasis inter printado kaj presado de nocio-kompleksoj, bindado kaj ekspedado de tiel ampleksa verko. Dum tiu tempo jam multaj novaj terminoj kaj komentoj estis aldonitaj kaj daŭre pliaj aldonoj kaj ŝanĝoj okazas.

Ĉiu rajtas aldoni komentojn al la registraĵoj por si mem kaj por diskonigo al aliaj kunlaborantoj. Kvankam nenies opinio estos cenzurata, la registrado devas okazi laŭ striktaj reguloj, por ke **1-e** ĉiu posta leganto de la registraĵo sciu, kio estis aldonita, kiu estis la aldoninto kaj kiam la aldonado okazis; **2-e** la tekstoj restu facile super-rigardeblaj, kaj ne plenigu pli da spaco, ol nepre necesa. La disko-materialo ne estas multekosta. Tamen eĉ centmegabajtaj dur-diskoj rapide pleniĝos pro la amaso de la registrinda teksto. Tial ni utiligas multajn mallongigojn kaj forigas ripetojn de la samaj argumentoj.

Certe ĉiu serioza studanto de la verko trovos ion kritikindan. Li esprimu tiun kritikon aŭ mem registrante ĝin aŭ petante amikon, kiu disponas pri komputoro, ke tiu ĉi registru la kritikon; aŭ li esprimu sian kritikon en letero. Mi aŭ miaj kunlaborantoj klopodos registri ĉion akurate kaj ni klopodos respondi, se temas pri pli grava kritiko ol malkovro de preseraro. Tiuj kritikoj aŭ novaj proponoj povas esti valoraj stimuloj por evoluigi nian lingvon. Pri tio ni parolu venontfoje.

Kiel trovi trafajn terminojn por ĉiutagaj nocioj?

Al Esperantistoj ofte mankas terminoj por modernaj nocioj, kiuj ankoraŭ ne estas registritaj en etnolingvaj-Esperantaj vortaroj. Kion ili povus fari por helpi sin?

1. La plej rekomendinda metodo estas krei novajn terminojn el jam ekzistantaj elementoj de nia lingvo. Ekzemple por la Germana *Strumpfhose* aŭ la Angla *pantie-hose* ni povus krei la terminojn "pantalono-ŝtrumpoj", "ŝtrumpo-pantalono", "ĝistalia ŝtrumpo-paro". PIV nomas tiun nocion "ĝistaliaj ŝtrumpoj". Sed kiu termino estas preferinda? Dezirinde estas, kompreneble, ke nur unu termino ekzistu. Prefere oni selektu tiun terminon, kiu jam estas registrita en PIV. Sed en tiu verko bezonata termino estas kelkfoje nur malfacile trovebla ("ĝistaliaj ŝtrumpoj" ekz-e estis registrita kiel lasta ekzemplo por "ŝtrumpo"). En la Esperanta Bildvortaro la nocio ankoraŭ ne estas bildigita. Tamen ĝi troviĝas en la pli novaj etnolingvaj versioj de tiu verko, por kiu mi nun preparas la Esperantan tradukon. Sed tio ne helpas al Esperantistoj, kiuj tuj komercele aŭ en ĉiutaga vivo bezonas tiun terminon.

2. Danĝere estas solvi la problemon per la dua vojo, kiel montras la artikoleto "kolantoj, kolgotoj", kiun mi legis en "esperanto", aprilo 1993, p. 72). Mi citas el tiu artikolo:

Tute alia situacio kreiĝis kiam mi eklaboris en nia "Esperanto" Komerca Agado (EKA). Fakte ekzistas en la mondo miloj kaj miloj da komercaj artikoloj, kiuj ne havas Esperantan nomon. Sekve ni devis inventi ilin! Temas pri serioza problemo, ĉar kio okazus se dise en la mondo oni uzus malsaman nomon por la sama varo? Jen klariga ekzemplo: Parolante pri virinaj kalson-ŝtrumpoj okcidente nomataj "collants" mi uzis la vorton kolantoj, sed miaj rusaj kunparolantoj absolute ne komprenis pri kia varo mi parolas. Poste ili demandis min pri kolgotoj, vorto tute ne konata al mi. Nur post longa baraktado mi fine komprenis, ke ni parolas pri la sama aĵo. Ĉiutage aperas pluaj

tiaj problemoj: "ĉemizo" havas ekzemple tro limigitan signifon por dekoj da tute malsamaj brustovestoj. Aŭ: ekzistas du apartaj tipoj de porvirinaj kalsonetoj (ne kalsonoj!), kiujn komerce oni nomas *slip* kaj *boxer*. Esperante do, ĉu "slipo" aŭ "slipeo", "bokso" aŭ "boksero"? La Akademio verdiktas pri la oficialeco de nova termino nur kiam longa, sistema uzado sankciis ĝin. Sed dume ĥaose enkondukiĝas malkongruaj formoj. Ĉu oni povus starigi malgrandan komisionon de du aŭ tri kompetentuloj, kiuj povus doni sian rapidan juĝon rilate al enkonduko de nova radiko, difinanta objekton pri kiu ankoraŭ ne ekzistas ĝenerale uzata Esperanta termino? Liston de novelektitaj vortoj oni povus aperigi en la ĉefaj E-gazetoj, kiuj sendube ne rifuzus doni al sia legantaro tiun ĉi servon.

Ni kreis nian EKA por disvastigi la internacian lingvon kaj doni eblon al esperantistoj gajni monon per ĝi. Ĉu por daŭrigi nian agadon, pro manko de taŭga vortprovizo, ni devos ekuzi la anglan? "Siriusano" (laŭ "La eta gazeto", revuo de Triesta E-Asocio, Italio)

Tiu pragmata artikolo tre bone montras la problemojn, kiuj alfrontas nin. Feliĉe ne plu necesas krei tiun komisionon, ĉar tiun taskon pli efike povas plenumi la Pekoteko-metodo, pri kiu mi jam ofte atentigis Esperantistojn (ankaŭ en la Esperanta Bildvortaro). Tamen evidente ne sufiĉe ofte, ĉar tiu artikoleto malkaŝas, ke eĉ lingvaj aktivuloj ne estis informitaj pri ĝi. Se Siriusano estus skribinta al la Akademio, Sekcio Fakaj Vortaroj, mi estus rekomendinta al li la terminon "ĝistalia ŝtrumpo-paro". Nun, por averti aliajn Esperantistojn, mi tuj registris Pekoteko-komplekson 93/135 pri tiu ĉi nocio. Al tiu registraĵo mia edzino poste aldonis ankoraŭ sepan proponon: "taliŝtrumpo". Kiun terminon vi preferus? Ĉu vi povus fari ankoraŭ alian proponon?

Ne havas sencon voĉlegi la tutan nocio-komplekson. Ĝi troviĝas en la 1993-a serio de

Peko=teko kaj en la apendico de la libreto, kiu akompanas la paroladetojn.

{U1} 646

{T1} TNI

{eo1} **ĝis'tali/a ŝtrump/o-par/o** *a

{eo2} **ĝis'tali/aj ŝtrump/oj** *b

{eo3} **pantalon-ŝtrump/oj** *c

{eo4} **ŝtrump/o-pantalono** *a

{eo5} **kolant**/oj** *f EVIT *a

{eo6} **kolgot**/oj** *f EVIT *a

{eo7} **taliŝtrump**/o** *g _

{es1} leotardos ∞ los *d

{de1} Strumpfhose *f* *ĉ _

{en1} pantie-hose *ĉ _

{fr1} collant *m* *d _

{nl1} panty *e

Longa pantalono kun ŝtrumpoj el ŝtrump-materialo. EB3/32=12 *a

Fon: *a *ei*; *b PIV; *c *ei*: mi ie renkontis tiun terminon, sed ne memoras la fonton; *ĉ DB3-DeEn; *d DB3-EsFr; *e DB3-DeNl; *f Esp93/p72; *g *vse*;

93/135

Rim: *ei* (93-05-05): {eo1} ŝajnas al mi la plej trafa termino, ĉar ĝi evitas la misgvidan Anglisman pluralan finaĵon, temas pri nur unu pantalono, al kiu estas fiksitaj du ŝtrumpoj. La evitindecon de {eo5} aŭ {eo6} montras la artikolo *f.

vse (93-05-24): {eo1-eo4} ŝajnas al mi tro longaj por ĉiutaga uzo precipe en familio. Kvankam {eo1} celas esti priskriba ĝi laŭ mi ne estas korekta, ĉar ne temas pri apartigebla paro. Ankaŭ terminoj {eo2+3} ne estas korektaj pro uzo de pluralo. Temas nur pri unu sola objekto. {eo5+6} estas mallongaj, sed rekoneblaj nur de relative malmultaj homoj. Tial mi proponis terminon {eo7} «93-05-24»

Lingvaj aktivuloj, kiuj sentas la mankon por terminoj, tial povas Pekotekante ricevi pli rapidan respondon al iliaj problemoj, ol se ili estus devigitaj atendi publikigon de respondoj en iu revuo. Pekoteko- registraĵoj estas rapide troveblaj pere de UDoKo -- 646 ekz-e servas

por vestoj kaj korpo-flegado -- kaj pere de mult-lingvaj indeksoj.

Por ke ni disponu pri la dezirataj modernaj terminoj, ĉiuj pri la lingvo-evoluigo interesitaj Esperantistoj eklaboru laŭ la sama skemo: Se iu konstatas mankon de termino, tiu difinu ĝin kaj atribuu al ĝi tiujn etnolingvaj terminojn, pri kiuj la difinanto certas, kaj tiu aldonu, se necese, desegnon. Ĉe *slip* ekzemple ne sufiĉas la Anglalingva termino, kiel la desegno 32 en EB3 montras: La subvesto, kiun la Angloj nomas *slip*, aspektas tute malsame ol *Slip* en la Germana. Kroma kialo por eviti la terminon "slipo" por vestaĵo. *Boxer* havas en miaj vortaroj nur la signifon de hundoraso (boksero EB#71/10) aŭ de boksisto, tial ŝajnas al mi dubinda, ke oni ĝenerale en la Angla atribuis al vestaĵo la nomon *boxer*. Necesas pli detala esploro antaŭ ol atribui alian signifon al jam ekzistanta Esperanta termino.

Kiuj principoj ricevu prioritaton?

Je termino-selekto aŭ je kreado de novaj terminoj termino-kreantoj devas ofte fari kompromisojn inter diversaj sin kontraŭantaj principoj. Ekzemple termino devus esti kaj preciza kaj konciza. Por krei precizan terminon, tiu ĉi devas konsisti el multaj difinantaj elementoj, kio kontraŭus koncizecon. Tial kompromisoj ne estas eviteblaj.

Alia principo estas, ke novaj Esperantaj radikoj devus esti internacie uzataj etnolingvaj vortoj aŭ terminoj. Tiu ĉi principo baziĝas sur la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiketo, kiu postulas: *La tiel nomataj vortoj fremdaj, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.*

Pere de tiu ĉi regulo Esperanto kapablis akiri senfinan nombron da novaj radikoj kaj daŭre nia lingvo pliriĉiĝas per apliko de la 15-a regulo. Tamen samtempe ni heredis per tiu "natura procedo" ankaŭ la multajn nelogikaĵojn, kiuj troviĝas en la hazarde kreskintaj etnaj lingvoj. Tial apliko de la 15-a regulo kaŭzis malobeon al postuloj de logiko kaj analogio, kiel montras bonega artikolo de Bernhard Golden "Erarvagante en la verda 'Graflando'". Mi reprenis ĝin en "Akademiaj Studoj 1988-1990" kaj en "Plena Pekoteko 1985-1990" (p. 1678), ĉar ĝi konvinke montras, ke ni pli singarde devas apliki la 15-an regulon, por ke ni ne peku kontraŭ la "principo de analogio", ke oni formu derivaĵojn de similaj terminoj simil-maniere.

Tiu je la graf-terminoj ekzistanta ĥaoso kondukas nin al la demando, ĉu ni akceptu la "principon de antaŭeco", tio signifas, ke se por iu nocio jam estis kreita termino, ke ni ne proponu alian terminon por la sama nocio. Aŭ ĉu ni provu forigi la mankon de analogio per

novaj, pli sisteme formitaj terminoj? Mi certe preferas la lastan vojon. La peno de la malmultaj nunaj Esperantistoj lerni etajn ŝanĝojn en nia lingvo, precipe se tiuj baziĝas sur logiko aŭ estas analogie formitaj, estas konsiderinde pli malgranda ol la peno por estontaj generacioj lerni tiujn neregulaĵojn. Akordiĝante kun nia Fundamento ni klopodu per etaj paŝoj fari nian lingvon ankoraŭ pli regula, por ke estontaj generacioj povu mastri ĝin pli facile.

Se ni legas etnolingvajn literaturon aŭ simplajn informojn verkitajn antaŭ centjaro, ni tre ofte konsciiĝas ke ŝanĝoj en la lingvo-uzo okazis. En Esperanto tiaj ŝanĝoj estas pli malfacile konstateblaj. Tial ni ne devas timi, ke nia lingvo per kelkaj paralelaj vortformoj tiel ŝanĝiĝos, ke post nur malmultaj jarcentoj Esperantistoj ne plu komprenos la klasikajn verkojn de Zamenhof. Paralelaj vortformoj estas ekz-e: "akuo" anstataŭ "akumulatoro", "transformilo" anstataŭ "transformatoro", "lingviko" anstataŭ "lingvistiko", "epigrafiaĵo" anstataŭ "epigrafo".

Ĉu estu preferata la plej internacia aŭ la plej logika termino? Laŭ mia opinio ni ne povas doni ĝeneralan respondon al tiu ĉi demando. Mi konstatis, ke kelkfoje la plej internacia termino ŝajnis al mi preferinda, kelkfoje la plej logika. Per la nun de mi pere de Pekoteko lanĉita enketo mi esperas esplori la sintenon de Esperantistoj pri prioritato aplikindaj principoj.

Mi havas la impreson, ke ĝenerale la respondoj dependas de la ĉefa tasko, kiun Esperanto plenumu laŭ la opinio de la respondinto. Por mi tiu tasko estas: Esperanto ebligu egalrajtan rektan komunikadon pri ĉiuj temoj inter ĉiuj Teranoj. Sekvo de tiu deziro estas, ke la lingvo devas esti facile lernebla por parolantoj de iuj ajn lingvoj. Duono de la homaro parolas nun Hind-Eŭropajn lingvojn. Tial por tiuj homoj estas pli facile lerneblaj vort-radikoj el Hind-Eŭropaj lingvoj, el kiuj 99% de Esperantaj lingvo-elementoj estis prenitaj. Tiu proporcio povas ŝajni maljusta por la alia duono de la homaro. Por esti pli

justaj ni devus preni kiel bazon por nia vortaro malgrandan ne-Hind-Eŭropan lingvon, eble la Hungaran aŭ la Estonan. Tiam preskaŭ ĉiuj homoj havus la samajn malfacilaĵojn lerni la lingvon por ĉiuj Teranoj. Prave. Tamen ĉu parolantoj de ne-Hind-Eŭropaj lingvoj estas vere tiel etmensaj, ke ili ne volus permesi, ke duono de la homaro havu malpli da malfacilaĵoj lerni la komunan lingvon ol ili mem? Se ni krude taksus la horojn bezonatajn por ĉiuj homoj lerni la nunan Esperanton, kaj se ni kompare taksus la horojn bezonatajn por lerni planlingvon bazitan sur malgranda ne Hind-Eŭropa lingvo, ekz-e sur la Hungara, tiam la tempobezono por lerni la Hungar-bazitan plan-lingvon por ĉiuj homoj sendube estus la multoblo de la tempo bezonata por Esperanto. Tial la "Hungar-baza planlingvo" havus neniun ŝancon por sukcesi. Tial probable neniun serioze plendos, ke Esperanto diskriminacias kontraŭ duono de la homaro, ĉar la alia duono pli facile povus lerni ĝin. Ĉiukaze Esperanto estas pli facile lernebla kiel dua lingvo por ĉiuj homoj ol iu ajn etna lingvo.

Aliflanke konsciante ke Esperanto ja diskriminacias kontraŭ duono de la homaro ni ne subtenu la principon, ke por gardi la Latinidan impreson de nia lingvo novaj radikoj estu selektitaj ĉefe el Hind-Eŭropaj kaj precipe Latinidaj lingvoj. Kontraŭe ni klopodu, kiel Tibor Sekelj rekomendis, enkonduki en nian lingvon elementojn el ne-Hind-Eŭropaj lingvoj, se ni povus formi el tiuj lingvoj trafajn terminojn. Tiel parolantoj de tiuj lingvoj sentos, ke ni ne havas la intencon diskriminacii kontraŭ ili. Tiu sento gravas, se ni deziras, ke ankaŭ ili lernu nian lingvon. En Pekoteko mi tial registris la glosaron kun tiuspecaj terminoj el "Mondo de Travivaĵoj" (85/269-85/286).

Alia sekvo de la deziro, ke la lingvo estu facile lernebla por parolantoj de iuj ajn lingvoj, estas, ke la konsistigaj elementoj de termino ne misgvidu la lernanton pensi pri alia nocio ol la alcelita. Sen lingvo, sen konscio pri abstraktaj nocioj, neniun povus esprimi

pensojn. Eĉ estas diskuteble, ĉu homo entute povus pensi, se tiu ĉi ne konus iun lingvon. Tial gravas, ke la lingvaj elementoj el kiuj konsistas termino, gvidas la homon pensi pri la alcelata nocio. La termino-elementoj de "radiatoro" pensigas, ke temas pri "atoro" (= pli-malpli aŭtomate funkcia aparato) kiu radiadas. Ĝi tial estas trafa termino por kurtondo-radiatoro, mikroonda radiatoro aŭ por kobalt-teleradiatoro, kiuj estas bildigitaj en la Esperanta Bildvortaro. Sed "radiatoro" ne taŭgas por nomi la aŭto-mobilan instalaĵon, kiu per konduko de akvo tra tubaro servas por malaltigi la motoran temperaturon. Pli trafe estas nomi ĝin "varmo-transigilo" aŭ akronime "vatro". La samo validas por la varmo-transigilo en centrala hejt-sistemo. "Varmo-transigilo" aŭ "vatro" ne estas internacie uzataj terminoj, sed la konsistigaj elementoj de tiuj terminoj indikas pri kio temas, kaj tial ili estas facile memorigeblaj. Pere de Pekoteko ni povas averti kontraŭ misaplikoj de terminoj, kaj ni povas libere diskuti pri tio.

Ĉu laŭ-sona aŭ laŭ-skriba transskribo? kaj speciale: Kiel transskribi vortojn, kiuj etnolingve finiĝas per -er?

La 15-a Regulo de nia lingvo diras, ke "... vortoj fremdaj, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo"; sed ĝi ne specifas kiun etnolingvan vorton oni prenu kiel bazon, ĉu la skriban aŭ la parolan. Se ni studas Esperantajn vort-radikojn, ni trovas ke kelkfoje la skriba, kelkfoje la parola vortformo servis kiel bazo, kaj kelkfoje la Esperanta radiko estas kompromiso inter ambaŭ formoj: En "teamo" la bazo estis evidente la skriba, ĉar la parola formo estus liverinta al ni la vorton "timo", kiu ekzistas en nia lingvo jam kun tute alia signifo. Ankaŭ "biero" havas kiel bazon la skriban vortformon, ĉar la parola estus "biro". Kontraste al tio "eŝafodo" estas laŭ-sona transskribo de *échafaud*, kaj en "fazeolo" (el *phaseolus*) la interna "z" estas klarigebla nur per la tendenco voĉigi intervokalan s-sonon. Do ni rajtas transskribi etnolingvajn vortojn kaj laŭsona kaj laŭskribe, per iu ajn metodo, kiu liveras la plej klarajn kaj ne miskompreneblajn terminojn.

Tre ofte etnolingvaj terminoj finiĝas per -er. Tiuspecajn vortojn Zamenhof ne unuece transskribis: Apud "sukero" kaj "vetero" ni trovas "metro" kaj "decembro". Kelkfoje -er estas ellasita: "kelo", "ledo", "glimo". En pli postaj periodoj oni, laŭ mia impresio, preferis transskribi vortojn grafike sen konsidero al tio, ke la akcento pro grafika transskribo ne plu falas sur la saman silabon, kaj ke tial laŭprononco la Esperanta vorto fariĝis pli mal-facile rekon-ebla. Ekz-e "pulovro" ŝajnis al mi pli bone rekonebla ol "pulovero". La per grafika transskribo kreitaj vortoj montris "ero-aspekton", kion oni ofte kritikis je la PIV-a termino "komputero". Ĉu ekzistas preferoj, kiel ni unuece transskribu vortojn finiĝantajn per -er? Evidente tio estas afero de gusto. Tial mi klopodis jam en 1972 esplori la sintenon de Esperantistoj, ĉar estus bone, se ni

havis regulojn pri transskribado de la -er-finaĵo. Mi tiam aranĝis voĉdonon pri tiu punkto, kiu montris klarajn preferojn por laŭsona transskribo. Tamen la 116 tiamaj voĉ-donintoj ne formis sufiĉe larĝan bazon. Tial mi aranĝis multe pli detalan voĉdonon en Pekoteko, por ke ni eksci, kiuj transskriboj estas ĝenerale preferataj.

Je transskribo de Anglaj terminoj la diferencoj inter laŭsona kaj laŭskriba transskriboj estas precipe grandaj: Oni opiniis en 1986, ke ekzistas ses diversaj specoj de kvarkoj (fundamentaj partikloj, kiuj formas protonojn, neŭtronojn kaj multajn aliajn partiklojn). Ilin oni baptis Angle: *up, down, charm, strange, top and bottom quark*. Kiel ni transskribu tiujn nomojn? Ĉu laŭsona: ap-, daŭn-, ĉarm- strejnĝ- top- kaj maltop-kvarkoj? Aŭ laŭskribe: up-, doŭn-, ĉarm-, strangĝ-, top- kaj botom-kvarkoj?

La problemo de laŭsona aŭ laŭskriba transskribo ekzistas ankaŭ ĉe propraj nomoj. Krome estas decidinda, ĉu propraj nomoj devus ricevi la finaĵon de substantivo. Tial ekzistas 4 eblecoj por transskribi la nomon de la fama komponisto: Mozart, Mozarto, Mocart, Mocarto. La granda enketo espereble montros klarajn preferojn, kiuj helpas nin apliki similajn principojn ankaŭ je transskribo de aliaj nomoj.

Al la trivoluma "Plena Pekoteko 1985-1990" estas aldonitaj po du 68-paĝaj respondiloj kun preskaŭ identa enhavo. La respondiloj A estu responditaj de la persono, al kiu la tri volumoj estis ekspeditaj. La respondilon B respondu persono, kiu havas la eblecon studi la tri volumojn, kio nepre necesas por povi doni valorajn respondojn. Se iu ne kapablas studi la prezentitajn argumentojn, tiam la respondoj havas neniun valoron. Mi rekomendas, ke ambaŭ respondontoj preparolu inter si la donotajn respondojn, tamen neniun provu persvadi la alian personon, voĉdoni same kiel li. La donitajn respondojn oni notu en la Tria volumo per malsamaj koloroj, por ke ĉiu memoru sian

voĉdonon kaj povu kontroli, ĉu la donitaj poentoj estis akurate registritaj.

Oni respondu la demandojn nur, post kiam oni jam alkutimiĝis al la maniero kiel terminoj estas registritaj en Pekoteko kaj kiel la diskutoj okazas. Mi estos kontenta, se mi ricevus la respondilojn post unu jaro, sed kompreneble mi ĝojus ricevi pli rapidajn reagojn. La enketo ne havos redakto-finon. Oni rajtas resendi sian enketilon iam ajn kaj oni eĉ rajtas ŝanĝi iam esprimatajn opiniojn. La programo senpene rekalkulos la rezulton, post kiam la aldonitaj aŭ ŝanĝitaj dataoj estos registritaj. Ĉiu respondinto indiku sur la enketilo, sian deziratan nom-mallongigon. Se la saman mallongigon elektis jam alia persono, ni aldonos distingajn identigajn ciferojn. Ni ne akceptos anonimajn respondojn. Necesas, ke ni registru ankaŭ adreson sub kiu la respondinto estas atingebla. Tiun adreson mi publikigos, por ke ĉiu havu la eblecon kontroli, ke realaj personoj estis la respondintoj, kaj ke ni korekte registris la donitajn respondojn.

Dum la voĉdono oni ne per kruco indiku la preferatan formon. Oni en ĉiu demando-komplekso rajtas distribui maksimume 9 poentojn. Se iu preferas nur unu formon, tiu atribuu al ĝi ĉiujn siajn 9 poentojn. Se iu opinias, ke transskribo de persona nomo devus nepre esti laŭsona, kaj se tiu ne certas, ĉu la nomo devus ricevi la finaĵon de substantivo aŭ ne, la voĉdoninto povus atribui 4 poentojn al "Mocart" kaj 4 poentojn al "Mocarto". Tiel ĉiu kapablas klare esprimi siajn preferojn, kaj se ni adicios la respondojn de cent personoj ni ricevos klaran bildon pri la preferoj de tiuj personoj. Antaŭ ol plenigi respondilon nepre studu unue la en la Tria Volumo donitajn detalajn klarigojn (ekde paĝo 1635). Se vi faris nur krucojn aŭ hokojn, ni ne povus akurate registri la respondojn.

Akronimoj kaj inicial-vortoj

Inter Esperantistoj, kiuj provas krei la en nia lingvo ankoraŭ mankantajn fakajn terminojn, ekzistas du skoloj. En la unua oni asertas, ke laŭ la 15-a Regulo de la Fundamento novaj radikoj kaj terminoj devas nepre deriviĝi de internacie uzataj vortoj. Eĉ je bone establita terminoj ili pledas por uzado de alia radikoj, se tiu ĉi troviĝas en iom pli da lingvoj ol la en Esperanto kutime uzata radikoj. En "Filologo" (n-ro 36-37, p. 23) Bernard Golden ekz-e esprimis la opinion, ke "trabo" povus arkaiĝi kaj esti anstataŭita per "balko", kaj en AkSt. 86 (p. 95) mi reprenis artikolon de la sama aŭtoro pri "Kriterioj por la ĝusteco de Esperantaj vortformoj: Ĉu relajso aŭ relajo?" Mi ne konsentas kun li: Pli grava selekto-kriterio ol la iom pli granda internacieco estas por mi, ke nur "trabo" kaj "relajso" estas troveblaj en PIV kaj en niaj plej gravaj etnolingvaj vortaroj. Kaŭzus konfuzon, se ni subite sen vera bezono enkondukus sinonimajn terminojn. Ni respektu ĝisnunan lingvo-uzon, se ne gravaj principoj kontraŭas ĝin. Fakta lingvo-uzo havas por mi prioritaton antaŭ internacieco de radikoj.

Por Rikardo Ŝulco internacieco estas ankoraŭ pli grava faktoro. En *Sur la vojoj de la Analiza Skolo* p. 111, li reprenas la 15-an Regulon de la Fundamenta gramatiketo kaj post ĝi asertas: "*Tie temas pri la sola pordo tra kiu iu vorto fremda rajtas eniri en la Internacian Lingvon kiel neologismo.*" Tio signifus, ke je nova invento ni devus atendi multajn jarojn, por ke ni povu konstati, kiuj terminoj por tiu invento inter-naci-iĝis, por ke ni povu krei la bezonatajn Esperantajn terminojn!! Tiel ni kondamnas nian lingvon por ĉiama subevoluo. Internacieco estis bona principo, kiam Zamenhof kreis la lingvon, ĉar tiel ĝi povis rapide ensuĉi vastan stokon da "fremdaj vortoj", kiuj por Eŭropanoj estis relative facile lerneblaj. Sed hodiaŭ ni bezonas aliajn gvidliniojn, se ni deziras, ke nia

lingvo taŭgu por ĉiuj homaj agadoj nunaj, estintaj kaj estontaj.

S-ino Nagata apartenis al la alia skolo, ŝi volis faciligi nian lingvon al ne-Eŭropanoj. Tial ŝi rekomendis anstataŭigi Eŭropecajn fremdvortojn per vortoj, kiuj estas regule formitaj el Esperantaj vort-elementoj. Mi kaj multaj Esperantistoj simpatias kun ŝiaj klopodoj. Bedaŭrinde ŝi mortis en 1990. Tamen mi ne dubas, ke la de ŝi semitaj ideoj ankoraŭ longe efikos. Aliaj Esperantistoj verŝajne daŭrigos labori en la de ŝi intencita maniero. S-ino Nagata montris, ke oni povus krei el elementoj de nia lingvo la terminon "lingviko", anstataŭ daŭrigi la uzadon la internacia termino "lingvistiko", ĉar ne temas pri "iko pri lingvistoj".

Por ne-Eŭropanoj ŝiaj lingvikaj terminoproponoj probable estas pli facile lerneblaj, dum por Eŭropanoj la "Eŭrop-ismaj" estas pli facilaj. Kiujn terminojn ni rekomendu? Mi opinias ambaŭ specojn. Kiam mi vizitis elementan lernejon, mi unue lernis la gramatikajn terminojn en la Germana: *Hauptwort, Tätigkeits-wort, Eigenschafts-wort*. Nur kiam mi vizitis gimnazion, mi lernis uzi la "fremdvortojn" *Substantiv, Verb, Adjektiv*. Same ni povus agi en Esperantaj lerno-libroj por ne-Eŭropanoj aŭ por infanoj, kiuj ankoraŭ ne lernis la "Eŭropismajn" fakvortojn: en tiuj lerno-libroj aperu unue la "Esperantecaj" kaj nur poste la lernantoj familiariĝu kun la internaciaj "Eŭropismaj" terminoj. Anstataŭ "adjektivo" estis proponita "a-vorto", anstataŭ "substantivo": "o-vorto", anstataŭ "prezenco, preterito kaj futuro" : "as-tempo, is-tempo, ostempo". Longa listo de tiuj lingvikaj fakvortoj troviĝas en "Akademiaj Studoj 1988-1990". Ne estas antaŭvideble, ke estontaj generacioj uzos nur la Esperantecajn fakvortojn, ĉar por Eŭropanoj la "Eŭropismaj" ĉiam estos pli facilaj, ĉar ĉiuj lernis ilin en siaj lernejoj.

Se ekzistas la ebleco esprimi iun nocion per regula kunmeto de jam ekzistantaj Esperantoradikoj, mi kaj Esperantistoj de la dua skolo preferas laŭ rekomendo de Zamenhof

terminojn kiel "administrado, administrejo, administrataro, administrantaro" anstataŭ la ambiguan internacian "administracio". Tamen per regula kunmeto de jam ekzistantaj radikoj ni ne povus formi la multegajn terminojn, kiujn ni bezonas por priskribi modernajn teknikajn kaj sciencajn nociojn. Feliĉe ekzistas ankoraŭ tria ebleco por krei terminojn: kiel en etnaj lingvoj ni povus ankaŭ en Esperanto akronime formi novajn radikojn.

Mi montros ekzemplojn, je kiuj mi aplikis diversajn metodojn por krei Esperantajn akronimojn: La unua nocio, por kiu mi serĉis Esperantan terminon, ricevis en la Angla kaj Germana lingvoj jenajn el la Angla akronime formitajn nomojn:

Angle: *LED display (light-emitting diode display)*; Germane: *LED-Anzeige*.

Por mia unua termino-propono mi utiligis la Anglan mallongigon *LED*, kiu sufiĉe internaciigis, kaj kreis el ĝi per literuma transskribo novan silabe prononceblan radikon, kiun mi skribis per minusklaj literoj, ĉar ne temas pri propra nomo: "loedo-vidigilo" (85/459). "led-vidigilo" mispensigus, ke la vidigilo povus esti el led. "loedo" pli klare indikas, ke temas pri literuma transskribo. Alia kunlaboranto proponis "lumeda vidigilo", akronimo formita el "lum-emisianta diodo". Estas diskutinda, kiu termino estus por fakulo pli facile memorigebla. Mi tial aranĝis enketon pri tiu termino: "lumedo" estas pli Esperanta, sed sonas kiel besto-nomo kaj ne pensigas, ke temas originale pri mallongigo. Bedaŭrinde mi ne kapblis ekscii, kiel oni en la Germana prononcas "LED-Anzeige" (led-anzeige? el-e-de-anzeige? el-i-di-anzeige?). La fak-vortaro, en kiu mi trovis la terminon, neniam indikas prononcon. Probable oni prononcu LED laŭ Angla maniero! Kiam Germanoj vekigis kaj decidis denove purigis sian lingvon?

Kvankam mi ĉi-kaze preferas la literuman transskribo-metodon ni certe ne uzu ĝin je ĉiuj mallongigoj, kiuj povus en nia lingvo fariĝi akronimoj, ĉar tiel niaj novaj radikoj fariĝus

tro similaj pro la multaj o-oj.: ocoro (OCR →89/250), foeto (fet →89/186), emoso (EMS →89/180), codoromo (CD ROM →89/164), domoao (DMA →89/171), toso (TSR →89/146), coado (CAD →89/133). Eĉ monstran radikon ni tiel ricevus: "sopool/" (→89/154). Por eviti tion, mi rekomendas uzi krom literuma transskribo de etnolingva mallongigo ankoraŭ aliajn metodojn. Unu el ili estas: Traduko de la plena nomo en Esperanton kaj derivi de ĝi taŭgan mallongigon. La antaŭe menciita "lumeda vidigilo" estas ekzemplo de tiu metodo.

Angle: *LCD (liquid-crystal display)*; Germane: *LCD-Anzeige, Flüssigkristall-Bildschirm*; Esperante: likvid-kristala vidigilo; likrivo.

Angle: *optical character recognition, OCR*; Germane: *optische Zeichenerkennung, OCR*; Esperante: optika karaktro-rekonado; opkareo.

Angle: *field-effect transistor, fet*; Germane: *Feldeffektt transistor, FET*; Esperante: kamp-efika transistoro; keto.

Angle: *computer aided design, CAD*; Germane: *rechnerunterstützter Entwurf, CAD*; Esperante: komputor-helpata dezajnado; kohedo

Alia aplikebla metodo estas: "Derivo de la Esperanta radikoj rekte de la Angla akronimo": Angle: *simultaneous peripheral operation on line, spool*.. Tio signifas Esperante: "simultana periferia funkciado malaŭtonoma". Oni uzas neĉefan memoron kiel bufron por malgrandigi prokrastojn dum data-traktado, kiam dataoj estas transigataj inter periferiaj aparatoj kaj la procesoro(j) de la komputoro. Germane: *spulen* aŭ *spoolen*. (verŝajne oni prononcu ambaŭ verbojn same "ŝpulen"). Tiu ĉi termino ŝajnas al mi danĝere misgvida, ĉar ĝi pensigas pri "bobeni" (= volvi ĉirkaŭ bobeno (Germane: *die Spule*)). Lernanto de komputorado do povus mispensi, ke oni provizore surbobenigas iujn dataojn, kiujn oni traktos poste, por ke la sistemo pli rapide funkcii!! Tial mi malrekomendas uzi en Esperanto por tiu nocio terminojn kiel "spuli"

aŭ "ŝpuli". Tial mi rekomendas por Esperanto "spooli" (89/154) aŭ "spoolado" (93/136) por la procedo. Mi scias, ke kelkaj Esperantistoj klopodas nepre eviti hiatojn. Sed laŭ mi vorto kun hiato estas pli taŭga ol multe pli longa akronimo kiel siperfumalai (el "simultana periferia funkciado malaŭtonoma"). Temas ja pri malofte uzota pure teknika termino. La kvanto da terminoj formeblaj per la malmultaj leteroj de nia lingvo estas ege malgranda, se ni volas limigi nin al mallongaj vortoj.

Ankaŭ E. Spitaels (es) sukcese uzis akronimadon por krei Esperant-ajn terminojn de elektronikaj muzik-instrumentoj. Ekzemple anstataŭ la monstra plena termino *attack-decay-sustain-release* oni uzas en diversaj etnolingvoj nur *ADSR*. Esperante tio signifas: eksono-defalo-subteno-amortiziĝo aŭ mallonge: *edsa/o* (88/es-070). Li tradukis *DA-converter* per "diĝit-analoga konvertilo" = dianko kaj *AD-converter* per "analog-diĝita konvertilo" = andiko. En la Pekoteko-komplekso 89/278 mi sentis la bezonon iom pli detale traduki la plenan nomon: analog-al-diĝita konvertilo. Nur nun, kiam mi kompilis plenajn indeksojn, mi konstatis, ke "es" jam estis tradukinta *A-D converter*. (Tiel oni skribis la terminon en ComGlo.) Liaj akronimoj "andiko" kaj "dianko" ŝajnas al mi tre bonaj. Tial mi aldonis "andiko" en 89/278. Tio espereble montras, ke ankaŭ en Esperanto ni rajtas akronime krei novajn radikojn, ĉar ankaŭ etnolingve oni faras tion. Akronimado do estas nova metodo de radiko-kreado, pri kiu mi volonte aŭdus reagojn.

Kreado de inicial-vortoj estas alia metodo. Dum akronimo estas ĉiam silabe prononcata, inicial-vorto povas esti literume aŭ silabe prononcata. Kontraste al akronimo inicial-vorto konsistas nur el la komencaj literoj de la unuopaj vortoj en iu termino. Etnolingve ili estas ofte sed ne ĉiam skribitaj nur per majuskloj. La plej oftaj inicialvortoj en nia lingvo estas la mallongigitaj nomoj de organizoj kaj libroj: UAE, SAT, ILEI, PV. Ĉiujn tiujn mallongigojn ni kutime skribas per

majuskloj, ĉar temas pri propraj nomoj. Sed pri prononco de tiaj inicial-vortoj ekzistas problemoj. La mallongigoj por la Kanada, Korea aŭ Kuba Esperanto-Asocioj estas la samaj: KEA. Kiel oni prononcu tiun mallongigon: "kea?", "koea?". Kiel ni prononcu PIV? "piv?", "poivo?", "pivo"? Ĝis nun mi nenie trovis regulojn aŭ proponojn por reguloj pri tio. Ĉar la 9-a Regulo de Esperanto postulas: "Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita", mi opinias, ke ni devus postuli, ke ni skribu ĉiun vorton en nia lingvo tiel, ke ne povas ekzisti la plej eta dubo, kiel prononci ĝin eĉ por persono, kiu neniam antaŭe aŭdis la vorton. Ĉar akronimoj ĉiam estas silabe prononc-endaj, ne ekzistas prononc-malfacilaĵo je ili. Tial mi proponas jenan prononc-regulon: Ankaŭ la inicial-vortojn ni ĉiam prononcu silabe, se tio ne eblus aŭ sonus malklare, ni aldonu literumajn o-ojn en la mallongigoj. Tial se la gvidantoj de Germana Esperanto-Asocio deziras, ke oni nomu ĝin mallongigite "goea" kaj ne "gea", tiam ili zorgu, ke la mallongigo de ilia asocio estu ĉiam skribita "GoEA". Se ni parolas pri Plena Ilustrita Vortaro, ni nomu ĝin nur "piv", tamen ni aldonu -on, se ni bezonas la vorton kun akuzativo: "Donu al mi PIV-on.". La internacia mallongigo IBM estas malsame prononcata en diversaj etnaj lingvoj. Por certigi, ke ni en Esperanto ĉiam prononcu ĝin same, mi nun skribas ĝin IBoMo. Tiel ni povas eviti, ke oni mislegos la nomon en iu el la kutimaj etnolingvaj prononcoj ("ajbiem" aŭ "ibeem").

Inicialvortoj de organizoj aŭ libro-titoloj estu ĉiam skribitaj per majusklaĵaj literoj, ĉar temas pri propraj nomoj (escepte se minuskla "o" estas intermetita por indiki la deziratan prononcon). La propra nomo "Unesko" tamen jam tiel enhejmiĝis en Esperanto, ke ĝi fariĝis vera akronimo, skribita per nur komenca majusklo.

Miaj proponoj estas nekutimaj. Tamen ili nur estas sekvo de strikta obeo de nia naŭa regulo. Pro la sama kialo ne devus esti permesata skribi "li/ŝi", ĉar ekzistas neniu

regulo pri prononco de oblikva frakci-streko. Oni skribu "li aŭ ŝi", kaj se estus tede en jura dokumento daŭre skribi "li aŭ ŝi" mi vidas neniun kialon por malpermesi akronime formi "ŝili" aŭ "ŝli". Nenio en la Fundamento malpermesas al ni aldoni novan pronomon, kies bezonon oni ne sentis en la Zamenhofa tempo.

Esperable mia pere de Pekoteko 1985-90 aranĝita enketo (Apendico D2.1) klare montros, kion oni opinias pri akronimoj kaj la prononcado de inicial-vortoj. Ni ne trudu tiujn novajn metodojn, kaj ni ne kondamnu homojn, kiuj ne ŝatas uzi ilin. Ĉiu selektu tiujn vortojn aŭ terminojn, kiuj plaĉas al ŝili. Kelkaj tiaj novaĵoj ne kaŭzos disfalon de nia lingvo. Pere de la kunteksto oni preskaŭ ĉiam povos diveni, kion nova vorto signifas. Se vi ne sukcesas fari tion, serĉu la vorton en PIV aŭ en la Esperanta indekso de Plena Pekoteko 1985-90.

Kial la Pekoteko-metodo ofertas unikajn ŝancojn al nia movado?

Pekoteko donas al ni la eblecon efike kunlaborigi Esperantistojn en la tuta mondo por kompili multlingvajn vortarojn sur kompaktaĵoj. Tiujn kompaktaĵojn ni eldonu, por ke ne-Esperantistoj, kiuj interesiĝas pri vortaroj, kapablu akiri ilin malmultekoste, se ili aĉetos codoroman (CD-ROM) draĵvon, ĉar mi opinias, ke pere de tiuj kompaktaĵoj ni povos facile konvinki ilin pri la utilo de nia lingvo, kaj ke ni povos igi ilin lerni nian lingvon, eĉ se ili neniam intencis fari tion. Jen mallonga klarigo de tiu ĉi plano: Codoroma draĵvo estas al komputoro konektebla aparato, kiu ebligas legi kompaktaĵojn, kiuj povas enhavi ne-imageble grandan kvanton da rapidege troveblaj informoj plej diversaj.

La codoroma vortara sistemo, kiun mi intencas realigi, funkcios tiel: Se iu ne-Esperantisto deziras trovi tradukon por vorto aŭ termino de lingvo A al lingvo B, tiu ne-Esperantisto (post enmeto de la kompakta disko kaj starto de la vortara programo) klavu en lingvo A la terminon, por kiu li serĉas la tradukon. Se li faris tion, aperos sur la ekrano unu post la alia ĉiuj nocio-kompleksoj, en kiuj troviĝas la klavita termino en lingvo A, kune kun Esperantaj difinoj kaj kun terminoj en aliaj lingvoj, kiuj taŭgas kiel terminoj por la nocio-kompleksoj. Se nur unu nocio-komplekso aperas, la en tiu komplekso indikita termino en lingvo B estas la serĉata termino. Sed kelkfoje pluraj nocio-kompleksoj kun malsamaj difinoj aperos, ĉar la sama termino en lingvo A povas indiki diversajn nociojn, kaj estas tial tradukebla per diversaj terminoj. Por helpi je la selekto de la plej trafa traduko, ni rekomendos al la serĉanto diveni la sencon de la diversaj Esperantaj difinoj. Se la serĉanto komprenas Hind-Eŭropan lingvon ekzistas bona ŝanco, ke tiu kapablos diveni la ĝustan sencon kaj selektos la terminon el la plej trafa nocio-

komplekso. Se ne, li devos malkovri la signifon de nekonataj vortoj per la Esperanta-etnolingvaj vortaroj, kiuj ankaŭ troviĝas sur la disko. Tiel uzontoj de la terminaroj estos forte stimolataj diveni la signifon de la difinoj, kaj samtempe lerni nian lingvon.

La produkto-kostoj por kompaktaĵoj kun 650 megabajtoj da registraĵoj -- tio estas la centoblo de la amplekso de la registraĵoj en la tri volumoj de "Plena Pekoteko 1985-1990"!! -- estas tiel malaltaj, ke ni por nur kelkaj dolaroj povos disponigi kompaktaĵojn kun multlingvaj vortaroj al vendistoj de disko-draĵvoj, por ke tiuj ofertu niajn kompaktaĵojn malalt-preze (kvazaŭ kiel reklamo) al siaj klientoj, por instigi ilin aĉeti de la vendisto la relative multekostan disko-draĵvon. Tiel ni kapablos grandkvante kaj senpene distribui tutmonde al intelekto agemaj homoj niajn kompaktaĵojn pere de vendistoj de codoromaj (CD-ROM) draĵvoj. La vendistoj anoncu en siaj reklam-folioj, kiuj anoncas multajn diversspecajn kompaktaĵojn, ankaŭ niajn multlingvajn vortarojn, kiuj estas haveblaj de ili je tre malalta prezo, se oni aĉetos de ili novan disko-draĵvon. Do aspektos kiel reklama oferto. Sed la vendistoj ne atentigu pri tio, ke la vortaroj estis kompilitaj de Esperantistoj kaj ke ili enhavas Esperantajn difinojn. Pri tio surpriziĝu la aĉetontoj de la disko. Ili ja ne povos plendi, se ili ricevis pli ol estis reklamita, kaj ke krom la Esperantaj difinoj ankaŭ instru-tekstoj por kaj informoj pri Esperanto troviĝas sur ĉiu disko.

Produkti tiel ampleksajn multlingvajn vortarojn libro-forme estus finance ne ebla. Sed la elektron-ika produktado de ampleksega verko sur unu kompakta disko ne kostus pli ol produktado de malgranda verko sur samspeca disko, kondiĉe ke ni ne devas pagi por la kompilado de la tekstego.

Codoromaj draĵvoj kaj kompaktaĵoj jam ekzistas kelkajn jarojn. Nun ili fariĝis tiel malmulte-kostaj, ke ordinaraj komputorantoj kapablos aĉeti ilin. Tio sendube okazos, kiam oni komprenos la utilon de codoromaj draĵvoj.

Por realigi la supre klarigitan inform-kampanjon pere de kompaktaĵoj nur du problemoj estas ankoraŭ solvendaj:

1. Devas ekzisti unuecaj kodaĵoj por ĉiuj literoj aŭ signoj de ĉiuj lingvoj sur nia ter-globo. Tiu problemo baldaŭ solviĝos sen nia interveno per plivastigo de la nuna 8-bita ASCII-kodo al 16-bita Unikodo. Pri ĝi jam inter-konsentis la plej grandaj firmaoj, kiuj produktas personajn komputorojn kaj programojn. La unuaj Unikodaj programoj verŝajne estos haveblaj en 1994.

2. Sed la duan problemon ni devos solvi, la taskon kompili la tekstojn por la kompakta disko. Tio ĉi estas kolosa laboro, kiu tamen estas ege facil-igata per utiligo de kompu-toroj. Krome ni povus distribui la laboron al multaj homoj, ĉar multaj Esperantistoj jam nun disponas, kaj multe pli da ili baldaŭ disponos pri komputoroj. Se ĉiu deka el ili pretus dediĉi iom de sia tempo al registrado, tiam la laboro ja estus plenumbla en malmultaj jaroj. Tion montras la 1816-paĝa "Plena Pekoteko 1985-1990", kies tekston registris nur 4 personoj.

Laborante por la projekto de kompaktaĵoj ni estos devigataj rapidege evoluigi nian lingvon, ĉar ni devas provizi terminojn por ĉiuj nocioj registritaj en la multlingvaj vortaroj. Tio estas la alia unika ŝanco por nia lingvo: Ni estas devigataj rapidege evoluigi nian lingvon. Tio verŝajne kaŭzos la kreadon de multaj fuŝ-terminojn. Tamen tio ne kaŭzos damaĝon, ĉar Esperantistoj alkiutimiĝ-intaj al la Pekoteko-procedo baldaŭ rimarkos tiujn fuŝaĵojn, kiujn ili rapide kapablos korekti. Tio ja estas ĝuste la avantaĝo de elektron-ikaj registraĵoj, ke korektoj kaj ŝanĝoj estas facile registreblaj.

Mi esperas ke troviĝos sufiĉe da volontuloj, kiuj senpage pretos kunlabori je tiu ĉi projekto. Ekzistas inter ni multaj pensiuloj, kiuj kiel mi ĝojus, se ili povus apliki siajn talentojn por realigi projekton, kiu multilate helpus venkigi nian lingvon. Se ni povus instigi tiujn homojn al kunlaboro, tiam mankantaj financaj rimedoj ne povos bremsi

la Pekoteko-projekton. Eĉ se ni komence ne sukcesos registri sufiĉe da tekstoj por plenigi tutan kompaktan diskon, ni povus plenigi ĝin nur duone per vortaroj en eble 10 lingvoj, kaj ni povus utiligi la malplenan spacon por Esperanto-kursoj en la plej diversaj lingvoj. Ĉiuokaze ĉiu kunlaboranto ricevos por sia laboro inter-ŝanĝe sur moldiskoj valorajn registraĵojn, nome la registraĵojn de multaj aliaj registrintoj. Ĉiu ricevos multe pli da registraĵoj ol la kunlaboranto mem registris. Ĉiu profitas de la laboro de multaj kaj li certe lernos multon dum tiu laboro. Post kiam la disko estos fabrikita, ĉiu kunlaboranto ricevos donace la kompaktan diskon, se tiu registris minimume duonan megabajton da teksto.

Multegaj font-verkoj, sur kiuj ni povos bazi niajn laborojn, ekzistas en bibliotekoj aŭ estas private posedataj de la kunlabor-antoj. Ni ne havos kopirajtajn malfacilaĵojn, ĉar ni ne simple kopios vortarojn, ni aldonos difinojn kaj terminojn en multaj lingvoj, kiuj ne troviĝis en la verkoj, el kiuj ni ĉerpis ter-minojn. La registrado kostas preskaŭ nenion, ĉar la mol-diskoj, sur kiuj la tekstoj estu registritaj, estas malmultekostaj kompare al la kvanto da teksto, kiu troviĝas sur ili. Krome la mol-diskoj estas perfekte reuzeblaj.

Ĉiu, kiu kunlaboros je la projekto, rimarkos baldaŭ mem la rezultojn de sia laboro. Li sentos, ke li vere kontribuas ion al la granda projekto. Tio estos stimulo por li daŭrigi la laboron, kaj instigi aliajn Esperantistojn agi same. Tial mi ne dubas, ke nia rondo rapide kreskos, post kiam kelkaj eklaboris kaj vidis la fruktojn de sia agado.

Mi esperas, ke en kelkaj landoj formiĝos centroj, kiuj specialiĝos pri apartaj laboroj. Tio povas esti la aldono de terminoj en la etna lingvo de tiu ĉi lando. Povas esti la prilaboro de terminoj en iu specifa scio-kampo. Aŭ specialigitaj laboroj, kiel aldono de ilustraĵoj, atribuo de UDoKo-numeroj. Estas tiom da laboroj farendaj, ke ĉiu povos trovi plenumindan taskon. Mi opinias, ke ni tiu-cele ne devos starigi burokratan organizon, sed estus utile, se la kun-laborantoj en iu

regiono povus inter si –konsenti, kiu zorgos pri la cirkuligo de la registraĵoj.

Ĝis nun malhelpis interŝanĝon de registraĵoj ne nur la manko de unuecaj kodaĵoj por la diversaj lingvoj sed ankaŭ teknikaj baroj: Registraĵoj de IBoMo-kongruaj komputoroj ne estis legeblaj de Mekintoŝaj kaj inverse. D-ro Broadribb en Aŭstralio ĵus informis min, ke li pretas konverti IBoMo-ajn Pekoteko-registraĵojn al la Mekintoŝa formato kaj inverse por ebligi ankaŭ al Mekintoŝ-uloj kunlaboron je la Pekoteko-projekto. Laborpretaj Mekintoŝ-uloj tial skribu al

D-ro Donald Broadribb
46 Great Eastern Highway
Bakers Hill WA 6562 - Aŭstralio

Pro la dum la lastaj jaroj akiritaj spertoj ni starigis klarajn regulojn pri la registro-maniero. Certe ili estas ankoraŭ plibonigeblaj. Eblus enkonduki ankoraŭ aliajn mallongigojn. Tamen ni evitu tro komplikigi la sistemon. Ĝi esence restu la sama, ĉar neniu ŝatas ŝangi labor-procedon, al kiu oni jam al kutimiĝis.

Unuafoje en la historio de Esperanto provizas nin la moderna tekniko per rimed-oj, por komune evoluigi nian lingvon. Tiu ĉi evoluigo ne plu estu tasko por malmultaj lingvistoj. Financaj problemoj por evoluigi nian lingvon per cirkuligo de moldiskoj ankaŭ ne ekzistas: ĉiu volontulo povus mem pagi la kostojn de la evoluiga laboro, ĉar tiuj kostoj ne estas pli grandaj ol tiuj de ordinara korespondado. Tamen tiu terminara laboro por la kunlaborantoj verŝajne estos pli interesa ol simpla ideo-interŝango per leteroj, ĉar ĉiu rimarkos la konkretajn rezultojn de sia laboro kaj sentos, ke li vere kontribuas ion al la komuna celo. En preskaŭ ĉiuj regionoj de la mondo ekzistas Esperantistoj kun plej diversaj talentoj kaj lingvo-konoj. Necesas, ke ni direktu tiujn talentojn kaj niajn ĝis nun malsamcelajn klopodojn al konkreta tasko, kiun ni kapablas kune realigi. Kiu pretas kunlabori?

Ĉu Esperanto ĉiam sekvu etnolingvan lingvo-uzon?

Jam antaŭ jardekoj mi kiel freŝbakita Esperantisto interesiĝis pri la verkoj de *Eugen Wüster*, en kiuj mi ofte legis pri "terminologia laboro". Mi neniam havis la ideon, ke tio ĉi povus signifi ion alian ol "laboro en la scienca fako terminologio", kiun *Wüster* mem fondis. Tradukante la Rekomendon R 1087 de ISO de 1969, preparita de Teknika Komitato ISO/TC 37 de la Inter-nacia Organizo por Normigo, mi kun surprizo konstatis, ke al "terminology" estis atribuitaj du malsamaj kaj konfuzigaj nocioj. Ĝi estis:

1. "Stud-kampo kiu okupiĝas pri formado kaj nomado de nocioj" (85/324). Tion mi ĉiam komprenis sub tiu ĉi vorto. Sed en la Rekomendo *terminology* estas ankaŭ:

2. "Kolekto de terminoj prezentanta nocio-sistemon precipe en speciala stud-kampo" (85/323). Por tiu ĉi dua signifo ekzistas en nia lingvo la termino "terminaro", kiun ni laŭ mia opinio devus uzi por traduki tiun nocion. Oni ja ĉiam traduku nociojn kaj ne vortojn! Kontrolante en PIV la difinon de "terminologio" mi kun surprizo konstatis, ke ĝi estis difinita kiel "aro da terminoj uzataj en unu scienco aŭ tekniko". (En PV "terminologio" ne estis registrita.)

Kiel la en 1990 reviziita eldono de la Rekomendo montras, oni provis forigi la ambiguecon de tiu termino per tio, ke oni taŭtologie atribuis al ĝia unua nocio la terminon "*terminology science*", do laŭvorte tradukita "termino-scienco-scienco"! (93/121). Evidente tio okazis, ĉar en kelkaj lingvoj oni pli kaj pli al kutimiĝis nomi la termino-provizon de iu fako simple "terminologio". Oficialigante tion la Teknika Komitato ISO/TC 37 pekis kontraŭ unu el la bazaj principoj menciitaj de Helmut Felber, la posteulo de *Wüster*, en sia *Terminology Manual* (p.173); "Evitenda estas la selekto de misgvidaj termino-elementoj." Ankaŭ etnolingve *-ology*, *-ologie* ĉiam indikas fakon

de scienco, tial oni devus krei alian terminon por la termino-provizo en iu fako.

Anstataŭ en mia Esperanta traduko sekvi la modelon de PIV kaj de la internacia normverko mi markis la terminon "terminologio-scienco" EVIT (evitinda) kaj tradukis la nocion simple per "terminologio". Krome mi decidis skribi leteron al la estro de la Teknika Komitato, en kiu mi rekomendis, ke tiu komitato diskutu la eblecon solvi la problemon simile kiel ni faris tion en Esperanto: en la Angla kaj Franca oni uzu por la nocio "kolekto de terminoj" la Anglizitan aŭ Francizitan versiojn de la Esperanta "terminaro": *terminary / terminarie*. De tiuj terminoj oni povus facile derivi la distingajn adjektivojn *terminaric / terminarique*. Simile oni povus agi en aliaj lingvoj. En la Germana "kolekto de terminoj" povus nomiĝi *die Terminarie* kaj ĝia adjektivo estus *terminarisch*. Nur per uzado de pli klaraj etnolingvaj terminoj oni povus determini la signifon de la nocio nomita *terminological standardization*, ĉar laŭ la en la normverko donita difino tio ĉi povus signifi "terminologia normigo" (tio estus: starigo de normoj pri terminologiaj principoj aŭ starigo de terminologiaj normoj). Sed laŭ la sama normverko *terminological standardization*, povus signifi ankaŭ: "terminara normigo" (tio estus: starigo de terminaraj sekcioj en teknikaj normverkoj kaj ilia aprobo fare de aŭtoritat-hava institucio). Do temas pri du tute malsamaj nocioj. Eĉ en kunteksto, legante la tutan difinon, mi ne povis diveni, kiun signifon la aŭtoroj de la difino intencis atribui al la termino *terminological standardization*. Simile ambiguaj estas la difinoj en kelkaj aliaj nocio-kompleksoj en tiu ĉi plej nova internacie aprobita "Rekomendo ISO R 1087". Konsciu, ke tiu ĉi dokumento havas nur 26 paĝojn kaj estas la rezulto de pli ol dudekjara laboro de la fama Teknika Komitato de ISO, establita por eviti miskomprenojn! Tio okazis, ĉar la kreintoj de la "ISO Rekomendo" atribuis prioritaton al

"establita lingvo-uzo" kaj ne al principoj de logiko kaj analogio.

Ni liberigu nin de la "komplekso de malplivaloro", kiu montriĝas per la postulo, ke Esperantistoj devus labori sur la terminara kampo "laŭ internacie rekonataj metodoj" (vidu la de la estrarano de UEA pri planado proponitan "koncizan strategion" por lingva evoluigo: "esperanto, aprilo 1993, p. 62). Tiuspeca laboro ne estu modelo por ni, ĉar ĝi evidente ne liveris kontentigajn rezultojn. Kontraŭe, mi opinias, ke la etnolingvaj laborantoj sur terminara kampo povus multon lerni de ni. Ni ne timu iri al la naciaj normigaj organizoj en niaj ŝtatoj kaj paroli kun la respondeculoj de tiuj organizoj montrante al ili, kiel fuŝa la plej nova normo ISO R 1087 estas. Atentigu ilin pri tio, ke Esperantistoj ne akceptis tiun normon, kaj ke la diversŝtataj normigaj organizoj laŭ la modelo de Esperanto povus kaj devus krei malambiguajn difinojn kaj terminojn. Same kiel en la Angla, Franca kaj Germana eblis krei novan klaran terminon surbaze de la Esperanta radikalo "terminar", oni probable povus ankaŭ en aliaj etnaj lingvoj krei novajn terminojn por la nocio "aro de terminoj". Tiuj novaj terminoj forigus la ambiguecon, kiu probable ekzistas ankaŭ en aliaj etnaj lingvoj. Instigu la respondeculojn pri lingva normigo en via lando, ke ili proponu tiun ŝanĝon en la plej nova ISO-Rekomendo R 1087. Tio certe helpos, ke ili kun pli da estimo traktos nian lingvon kaj la homojn, kiuj laboras por ĝi. Se la membroj de ISO/TC 37 ricevos de pluraj naciaj normigaj organizoj la proponon ŝanĝi la nunan R 1087, tiam oni en la Teknika Komitato ISO/TC 37 devos pridiskuti la terminologian komplekson denove, kaj mi ne dubas, ke ni povus venki.

Por nia informa laboro ni ricevus novan argumenton por la taŭgeco de nia lingvo, se ni povus montri, ke la Internacia Normiga Organizo ISO rekomendis sur Esperanto bazitan terminon por forigi la ambiguecon de terminoj, kiuj baziĝas sur la de Esperantisto (*Eugen Wüster*) kreita termino "terminologio".

Mi petas, ke ĉiu, kiu pretas entrepreni ion ĉi-rilate skribu al mi, por ke mi povu sendi al tiu volontulo kopion de mia Angla-lingva letero al la gvidanto de ISO/TC 37 kaj mian tradukon de ISO R 1087, kiu klare montras la ambiguecojn troviĝantajn en la nuna normo.

Samtempe ni povas rekomendi al la normigaj organizoj en la diversaj ŝtatoj, ke ili imitu la Pekoteko-aranĝon por etnolingva diskuto pri normigotaj terminoj en iliaj lingvoj. Esperantistoj certe pretos helpi la normigajn organizojn en la diversaj ŝtatoj, ĉar tiel ni povas pruvi al ne-Esperantistoj, ke sur kampo de terminara normigo Esperantistoj laboras per pli modernaj metodoj ol profesiaj termino-ologoj en etnaj lingvoj. La laboro de la diverslingvaj normigaj komitatoj ne konkuras kun la nia. Kontraŭe tiuj komitatoj povus helpi al ni, se ili kontribuus etnolingvajn terminojn al Pekoteko-registraĵoj, kaj ni povus helpi al ili, se iliaj terminoj povus aperi en niaj multlingvaj terminar-egoj sur kompaktaĵoj. Tial ni proponu kunlaboron al la normigaj organizoj de ISO en la diversaj ŝtatoj.

Estas vere ironie, ke la de *Wüster* fondita komitato plenumis tiel mizeran laboron pri la termino, kiu donis la nomon al la de *Wüster* fondita scienco-branĉo, ke Esperantistoj nun povas iri al la normigaj organizoj en la diversaj ŝtatoj por pruvi al la gvidantoj de tiuj organizoj, ke ili vere bezonas Esperanton, ĉar post 21 jaroj da laboroj interne de iliaj internaciaj organizoj ili ne kapablis komune verki malambiguan rekomendon, kies tasko estas servi kiel ilo por kompreni terminologian literaturon. Aŭ ĉu oni en la enkondukaj vortoj al la rekomendo volis diri, ke la tasko de la rekomendo estas servi kiel ilo por kompreni normigitajn terminarojn? Eble oni intence volis esprimi sin ambigue. Sed tiuspeca lingvo ne estu modelo por ni kaj por terminara laboro ĝenerale.

Sekvontaj paŝoj (I)

S-ro *Petty* deziris scii, kio estas mia sekvonta paŝo. Mi vidas multajn paŝojn antaŭ mi. Verŝajne dependos de la ricevotaj reagoj, kiujn mi unue plenumos. La paŝeton registri tiujn ĉi "Magnetofonajn paroladetojn pri Pekoteko" fakte kaŭzis peto de s-ro *Petty* registri sur kasedo respondojn al liaj demandoj, por ke li pere de la Pola Radio povu doni informojn pri la nova metodo de terminara laboro.

Farinte tiun laboron mi konstatis, ke estus utile disvastigi tiujn paroladetojn ne nur pere de la Pola Radio sed ankaŭ rekte pere de kasedoj, por ke tiuj paroladetoj povu servi kiel diskut-bazo en Esperantaj grupoj. Krome mi fotokopie produktis la tutan tekston, por ke aŭdintoj povu facile reiri al io dirita, se diskutantoj esprimas kontraŭajn opiniojn pri tio, kion mi diris. Diskuto pri diversaj atingoj kaj problemoj de Pekoteko-laboro espereble instigos multajn Esperantistojn al kunlaboro. Oni ne pensu, ke terminaran laboron rajtas partopreni nur spertaj lingvistoj. La terminologiaj principoj estas tiel bazaj, ke ĉiu nur iomete klera homo kapablas kompreni ilin.

Esence estas, ke Pekotekanto ne kolektas aŭ registras tradukojn por terminoj, sed ke ni unue kiel eble plej klare klopodas difini la nociojn, por kiuj mankas terminoj. La nocioj mem estas abstraktaj. Ili ne dependas de la uzata lingvo, kiun ni utiligas por formuli iliajn difinojn. Tamen la konkreta bildo, kiun homo havas en sia menso pri iu nocio, ekzemple pri la nocio de "pano" ja dependas de la medio, en kiu tiu vivas. Ĉar la nombro de nocioj estas multe pli granda ol la nombro de terminoj en iu ajn lingvo, ni ofte estas devigataj atribui la samajn terminojn al diversaj nocioj. Tial estas determinenda per kiuj karakterizaĵoj distingiĝas la nocioj, por kiuj ni serĉas apartajn terminojn. Tion ni faras per difinoj, kiuj formas la bazon de la nocio-kompleksoj. Kompleta nocio-komplekso enhavas krom difino la Esperantajn kaj etnolingvaj

terminojn, kiuj nomas la koncernan nocion (aŭ estas proponitaj por nomi ĝin), UDoKo-numeron por klasifi la nocion, font-indikan kampon, rimarkigo kampon kaj identigan Pekoteko-numeron.

Efike estas samtempe difini parencajn nociojn kaj krei parencajn nocio-kompleksojn. Tiel ni kreas la bazon por nocio-sistemo. Tio estas strukturita nociaro establita laŭ la rilatoj inter la nocioj, en kiu ĉiu nocio estas determinita per sia pozicio en la nocio-sistemo. Tiuj sistemoj povas esti grafike prezentataj en tre diversaj manieroj, kiel la desegnoj en la apendico montras.

Aldono de klasifaj numeroj de la Univerŝala Decimala Klasifiko (UDoKo) faciligas kreadon de nocio-sistemoj, ĉar tiel terminoj el parencaj fakoj povas aŭtomate kune aperi per helpo de komputoro. Tial, minimume unu UDoKo-numero estas indikita en ĉiu nocio-komplekso. Nur post kreo de difino kaj aldono de etnolingvaj terminoj, kiuj taŭgas por nomi la nocion, ni pensu pri selekto aŭ kreo de trafa Esperanta termino.

Probable oni proponos malsamajn terminojn, ĉar Esperantistoj aplikos diversajn prioritatojn al la ofte sin kontraŭantaj principoj, laŭ kiuj ili kreas aŭ selektos terminojn. Mi jam parolis pri tio en la antaŭa prelegeto "Kiuj principoj ricevu prioritaton?" La ekzisto de diversaj principoj stimulas la diskuton kaj instigas krei la terminojn diversmaniere. Tio helpas nin el la malmultaj lingvaj elementoj, pri kiuj Esperanto disponas, krei distingajn Esperantajn terminojn.

Mia tezo estas: Al ju pli da Esperantistoj ni ebligas kunlaboron, des pli bonajn terminojn ni kapablos krei, ĉar ĉiuj vidas la problemojn el iom aliaj vidpunktoj, pro tio ke dum niaj vivoj malsamaj lingvaj spertoj influis nian pensadon.

Kelkaj Esperantistoj alte aprezas la de mi rekomendatan labor-procedon, aliaj ne konsentas kun ĝi. Ĉeĥa koleĝino en la Akademio opiniis, ke la tri al ŝi senditaj volumoj de Plena Pekoteko meritas solidan trastudon, sed ke ŝi ne kapablos fari tion, ĉar ŝi

vivas dumtempe en kondiĉoj, en kiuj oni ne facile koncentriĝas. Tial ŝi sendis la volumojn al s-ro Werner en Brno, kiu unusola ŝajnis al ŝi kompetenta. Ŝi rivevis jenan respondon:

"Brno 1993-04-07.,

Koncerne la el via flanko proponitan prijuĝon de PLENA PEKOTEKO 1985-90 mi konfesas, ke mi ne okupiĝos pri la kompilaĵo, ĉar ĝi ne meritas investon de mia ne tro vasta libera tempo. Tiu ĉi starpunkto reflektas nesufiĉan kvaliton de la ampleksa verko. Konkize:

1. PEKOTEKO estas sistemo, kiu konscie ne atingas komune akcepteblan solvon de terminaroj, ĝi toleras individuan elekton el pluraj proponoj.

2. PEKOTEKO ne direktiĝas laŭ internacie akceptitaj principoj de la interfaka scienco terminologio (ISO); estas sensistema.

3. Gvidanto de PEKOTEKO alvokas al kunlaboro pri ĉiuj temoj ĉiun servopretan esperantiston, kio la aferon kondukas al senbrida amatorismo.

4. PEKOTEKO estas konsiderebla kiel interesa ludo de lingvo-ŝatantoj, sed la rezultoj, se publice trudataj al la lingvo, povas ĝin inlui noce."

1. Jes, mi konscie ne dekretas uzotajn terminojn, ĉar dum multaj jaroj mi spertis, ke la solvoj, kiujn aŭtoritat-hava institucio provis altrudi al nia lingvo, ofte ne estis la plej trafaj kaj ne kondukis al unueca termino- aŭ lingvo-uzado. Pensu nur pri la -ujo/io- aŭ -ita/-ata-disputoj. Multegajn bonajn Esperantistojn ni perdis per tiuj trudo-provoj. Multe pli saĝe ŝajnas al mi, permesi listigon de ĉiuj proponoj kondiĉe ke la proponinto koncize indiku, kial iu termino ŝajnas esti preferinda. Se tio okazis, aliaj personoj povas en la sama nocio-komplekso prezenti aliajn termino-proponojn kaj kontraŭargumenti. Pere de elektronikaj registraĵoj ampleksa opinio-interŝanĝo povas tiel okazi. Mi havas la impreson, ke Esperantistoj preferas havi la eblecon uzi sian cerbon kaj selekti tiun terminon, kiu ŝajnas al

ili preferinda, ol esti devigitaj uzi la lingvon tiel, kiel iu aŭtoritatulo postulas.

Tre bona ekzemplo, kiel fruktodona diskuto povas okazi en la kadro de Pekoteko estas la nocio-komplekso 85/289, kiu ricevis jenan difinon: *Iu ajn el la ecoj, kiuj konsistigas nocion (85/288). Ekzemplo: Inter la karakterizaĵoj de la nocio "arbo" troviĝas reproduktivo, ligna trunko kaj disbranĉiĝo je certa alto.* Pri tiu ĉi nocio esprimis s-ro Werner (we) en sia "Termino-logia Kurso" (paĝo 3) la opinion, ke la de mi preferata termino "karakterizaĵo" estis „tro larĝ-signifa komuna nomo“. Mi kontraŭdirante, prezentis mian opinion. Post tio we rifuzis daŭrigi la diskuton. Tamen, kelkaj aliaj Esperantistoj aldonis siajn rimarkigojn. Ĉio tio okazas publike kaj iam ajn ĉiu komentinto rajtas ŝanĝi la esprimatajn pensojn. Sed nur la aŭtoroj mem de la publikigitaj rimarkigoj rajtas fari tion. Eĉ ĝenerala voĉdono pri diskutindaj punktoj nun okazas (vidu demandon #007, sur paĝo 1725). Laŭ mi tiu metodo estas vaste supera al la de s-ro Werner rekomendata metodo, ke oni pere de terminaraj komisionoj aŭ per libro kiel "Terminologia Kurso" provu devigi ĉiujn uzi la terminon "indico". Laŭ we en la difino en nocio-komplekso 85/289 devus troviĝi jena ekzemplo: *Inter la indicoj de la nocio "arbo" troviĝas reproduktivo, ligna trunko kaj disbranĉiĝo je certa alto.* Ĉu vi preferus la terminon "indico" malgraŭ la fakto, ke en la Germana, Angla, Franca, Hispana kaj eĉ la Rusa oni uzas terminojn, kiuj baziĝas sur la stamoj similaj al "karakter/"? Mi opinias, ke Esperantistoj legintaj la prezentitajn argumentojn ja kapablas mem decidi, kiun terminon ili preferas uzi.

2. S-ro Werner pruvu sian aserton, ke la Pekoteko-sistemo estas "sensistema". Laŭ mi Pekoteko estas realigo de la plej sistema terminara labor-procedo iam ajn ellaborita. Por mi la "internacie akceptitaj principoj" de ISO ne estas sekvindaj modeloj. Kontraŭe, mi opinias, ke etnolingvaj laborantoj sur la terminara kampo povus multon lerni de la Pekoteko-sistemo, kiel mi klarigis en mia

antaŭa paroladeto. Legu pri tio la registraĵojn 93/001 ĝis 93/127, kiujn ĉiu, kiu interesiĝas pri terminologiaj terminoj, povas ricevi de mi (US\$4.00 aŭ Kan\$ 5.00, aŭ DM 6.00, aŭ 6 internaciaj respond-kuponoj).

3. Esperanto bezonas amason de novaj terminoj, kiujn ni kapablas krei nur, se kiel eble plej multaj amikoj de nia lingvo kunlaboros. Mi ne timas proponon de fuŝaj terminoj, ĉar ĉiu Esperantisto rajtas reagi kaj mi promesas publikigon de la necenzuritaj opinio-esprimoj. Laŭ mi s-ro Werner havas la moralan devon ne kaŝi sin malantaŭ "ne tro vasta libera tempo", sed anonci kial almenaŭ kelkaj el la proponitaj terminoj ne plaĉas al li. Tiam la rekomendintoj aŭ proponintoj de la laŭ s-ro Werner fuŝaj terminoj povus reagi. Mi ne timas "senbridan amatorismon", ĉar ĉiu amatora ŝatanto de nia lingvo same kiel ĉiu profesia lingvisto estas devigata per la Pekoteko-sistemo defendi sian pozicion. Se iu preferas ne fari tion, tiam ĉiu povas tiri el tio siajn proprajn konkludojn. Mi fieras esti lingva amato same kiel Zamenhof, kaj mi havas la impreson, ke amatoroj kelkfoje pli klare vidas la problemojn ol profesiuloj, kiujn oni trejnigis akcepti lingvikajn dogmojn.

4. Pere de Pekoteko ni ne trudus iujn rezultojn, kio devus esti evidenta fakto el ĉio, kion mi skribis. Mi tre volonte scius, kiuj rezultoj povus influi la lingvon "noce". Ankaŭ al mi ne plaĉas ĉiuj en Pekoteko proponitaj terminoj. Sed mi ne volas agi kiel cenzuristo. Mi ne volas esti ĉiam la persono, kiu kritikis. Tial mi petas rimarkigojn de iu ajn, kiu opinias, ke li povas prezenti trafajn rimarkigojn por aŭ kontraŭ iu difino aŭ termino. Kio estas bezonata estas kunlaboro, se oni ne pretas fari tion, ĉar oni timas, ke alia persono povus prezenti argumentojn kontraŭ la propraj preferoj, tiam tiu persono pli bone silentu.

Per la labor-metodo rekomendita de s-ro Werner ni ne havas ŝancon krei la multajn terminojn, kiujn ni bezonas por ke oni povu uzi nian lingvon en ĉiuj sferoj de homa agado. Jam en 1975, kiam mi publikigis mian proponon de "Provizora Labor-Plano" mi kon-

statis, ke malgraŭ niaj klopodoj per eldono de fakaj libroj kaj vortaroj kaj per eldono de Slipara Vortaro, Esperanto en kreskanta grado postrestis la scio-eksplozon de la moderna mondo. Mi konstatis, ke nur per apliko de radikale novaj metodoj ni povus venki la ĉiam pli senteban mankon de Esperantaj fakaj terminoj. Feliĉe tiuj metodoj nun fariĝis aplikeblaj, tamen ili helpas nur, se multaj Esperantistoj kunlaboros laŭ la nova plano.

La Pola Radio kunlaboras

Ĝus mi ricevis de s-ro *Pettyn* la tekston de kelkaj lastatempaj radio-elsendoj sub la temo "El al notlibro de lingvouzanto." Temas pri dum dekoj da jaroj kolektitaj slipoj pri lingvaj detaloj. S-ro *Pettyn* diris pri tiu sliparo:

Tre ofte mi notis proponojn de pli-precizig-itaj difinoj de glosoj jam troviĝantaj en Plena Ilustrita Vortaro. Kelkfoje mi proponas novajn, pli kompletajn aŭ pli vastajn difinojn, kiuj iom pli ampleksigas la nociojn, konforme al la aktuala lingvo-uzo en esperantlingvaj amaskomunikiloj. Kelkajn difinojn mi akompanigas per kromaj ekzemploj, kunteksto. Ifoje mi notis tute novan difinon pro la fakto, ke laŭ mi tiu aŭ tiu difino de PIV estas erariga. Fine mi havas en mia kolekto amason da slipoj kun notoj plenaj de demando-signo, kio montras, ke mi havas dubojn aŭ mi ne trovis respondon al mia propra demando. Dum tiuj preskaŭ 35 jaroj, kiam mi profesie uzas Esperanton, mi sekvas konstantan evoluon de la lingvo. Precipe rimarkebla estas la pli kaj pli forta enpenetrado de vortoj devenantaj el la angla lingvo, ekz. dealer, disc jockey, establishment, lobby, country, rock ktp. Ĉu senkritike akcepti ĉi tiujn vortojn aldonante nur la esperantajn finaĵojn? Tio estas malfacile solvebla demando, kvankam la vivo mem solvas ĝin tute nature. Ekz. En la unuaj jaroj de mia esperantisteco mi ĉiam uzis la vortojn "amata ĉevaleto" por nomi la en la pola lingvo uzatan

vorton "hobby". Tamen de jaro al jaro la estoj komencis ĉiam pli ofte uzi la vorton "hobio". Fine ĝi aperis en la suplemento de PIV en la jaro 1987...

S-ro *Pettyn* tiam menciis pli trafan difinon, kiun li ellaboris. Plendon pro maltrafa difino de "hobio" mi estis ricevinta jam antaŭe de Esperantistino, al kiu mi montris, kiel en-Pekotekigi tiuspecan kritikon de PIV. Tial ne necesis aparte respondi al la kritiko de s-ro *Pettyn*. Mi simple printis por li la nocio-kompleksojn 93/jes-001 ĝis 003, kiujn mi publikigis en la apendico. Notu, ke pro la plendo pri nekomprenebla difino de la vorto "hobio" mi kreis tri diversajn nocio-kompleksojn el tute malsamaj fakoj, kion la UDoKo-numeroj montras. Tamen ili ĉiuj rilatas al la komplekso "hobio": 379.82 estas la numero por "Libertempo kaj ripozo hejme. Kulturaj interesoj kaj okupoj. Hobioj kaj distraĵoj." UDoKo 159.9 indikas psikologian temon. 159.955.1 temas pri Imagokapablo. Ideo-formiĝo. Fine UDoKo 688.72 klasifas ludilojn. Se miaj proponoj ne plaĉas al s-ro *Pettyn*, ni nun havas la ŝancon plibonigi ilin aŭ komenti pri ili. Tiel ni ĉiuj komune povas evoluigi nian lingvon. Pli efika maniero ne povus ekzisti.

Estas tre bone, ke s-ro *Pettyn* konservis siajn slipojn kaj ke li utiligis ilin por radio-elsendoj sub la temo "El la notlibro de lingvouzanto". El la teksto de tiuj elsendoj mi koncize en-Pekotekigis la esensajn komentojn kaj aldonis al ili aliajn Esperantajn kaj etnolingvajn terminojn kaj difinojn, kiuj baziĝas sur font-verkoj, pri kiuj s-ro *Pettyn* ne disponas. Krome mi aldonis kelkajn parencajn nocio-kompleksojn, por ke la temoj estu pli komplete traktitaj. Tiujn ĉi registraĵojn (93/143 ĝis 93/160) mi nun sendis al s-ro *Pettyn*, por ke li povu aldoni pliajn tekstojn. Post enkonduko de Unikodo mi volonte ricevus de li la Polaj terminojn por tiuj ĉi kaj aliaj kompleksoj.

Estus bone, se aliaj lingve aktivaj Esperantistoj povu simil-maniere prezenti pli-

bonigitajn difinojn, novajn termino-proponojn kaj kritikojn pri PIV-aj terminoj.

Mi esperas, ke tiuj ekzemploj klare montras la procedon, kiun ni nun povas apliki por publike trakti tiuspecajn plendojn pri difinoj aŭ mankantaj terminoj en PIV, la norm-verko de nia lingvo.

La ĝis nun ricevitaĵaj reagoj de Akademianoj, kiuj donace ricevis la volumojn "Plena Pekoteko 1985-1990" estis ĉiuj pozitivaj. La reago de s-ro Werner, al kiu mi jam respondis kaj kiu ne estas Akademiano, estas ĝis nun la sola negativa.

Kolego Pettyn (93-03-27): "*Gratulegon pro la mirinda trivoluma verkego! Morgaŭ mi tuj rakontos en 5-minuta programero pri ĝia apero kaj de lundo mi komencos en kelkaj programeroj prezenti ĝian enhavon. Sed mi faros tion - kiel kutime - en babila formo, sen teksto, ...*"

(93-03-30): "*... Al via Pekoteko mi dediĉis unu 15-minutan inter-parolon, kiun ni aŭdigis dufoje, kaj unu 4 minutan programeron. Baldaŭ ni aŭdigos pli da informoj por vekti interesigon ĉe la aŭskultantoj de Pola Radio. Tamen por pli amplekse popularigi vian tre utilan laboron, mi dezirus ricevi registrite per magnetofono respondojn al jenaj demandoj*". (Tiu ĉi letero instigis min, registri tiujn ĉi paroladetojn.)

Kolego Minnaja (93-04-23): "*... Inter-tempe min atingis la grandioza trivoluma verko Pekoteko, pri kiu mi ege dankas. Kompreneble mi ne sukcesis ĝin trastudi, kvankam mi bone legis la principojn kiuj ĝin regas. Volonte laŭ mia kapablo mi povos kunlabori pri italaj terminoj...*"

Kolego Broadribb (93-04-12): "*Min atingis bonstate la tri volumoj de Plena Pekoteko 85-90 antaŭ kelkaj tagoj, kaj mi nun zorge trastudis ilin kaj plenigis vian formular(i)on, kiun mi nun resendas. Farante tion mi konstatis ke la Pekoteko estas eble la plej grava entrepreno ĝis nun farita en Esperanto. Mi varme gratulas vin pro la ĝisnuna rezulto kaj povas nur miregi ke vi*

povis/povas dediĉi tiom da tempo kaj laboro al ĝi. Mi pretas aktive kunlabori pri la projekto. Mi bedaŭras ne esti povinta partopreni vian projekton jam antaŭ longe"

Dank' al zorge farita respondo al mia enketilo mi nun konas la opinion de tiu kolego pri diversaj lingvaj detaloj, kiuj ankoraŭ ne estas unuece solvitaj. Mi esperas, ke aliaj ricevintoj de la tri volumoj en simila maniero respondos al miaj multaj demandoj. Ne necesos, ke oni pravigu ĉiun esprimitan opinion per raciaj argumentoj. Eble pli grave estas la unua spontanea reago per distribuo de poentoj. Se iu poste konstatos, ke kelkaj respondoj estas ŝanĝindaj, tiam tiu rajtos anonci ŝanĝojn iam ajn. Tio ja estas la bela afero je tiu ĉi enketo, ke ĝi estas daŭra. Ne urĝas resendi la respondilon. Mi intencas registri la rezultojn nur post kiam cent respondoj alvenis.

Krom la laŭdaj vortoj de tiu kolego ĝojigis min, ke li esprimis pretecon aktive kunlabori je la Pekoteko-projekto - lin interesas aparte psikologiaj terminoj - kaj ke li eĉ pretis ebligi partoprenon en la laboroj al "Mekintoŝ-uloj", per tio ke li konvertos miajn IBoMo-ajn registraĵojn al la Mekintoŝ-formato. Tiel grava teknika bariero kontraŭ internacia kunlaboro falis. Ankaŭ en Usono nun ekzistas programo *MAC-IN-DOS* per kiu eblas konverti Pekoteko-dosierojn al la Mekintoŝ-formato. (US\$99.95). Mi ankoraŭ ne povus utiligi tiun programon, ĉar per mia malnova komputoro mi ne povas legi 3,5 colajn diskojn kun altega denso (1,44 megabajtoj). Kapablo bezonata por utiligi *MAC-IN-DOS*.

Falas nun la teknikaj baroj inter la diversaj sistemoj. Ĝus aperis la nova versio DOS 6, kun mirindaj novaj kapabloj kaj por 1994 oni prognozas la aperon de MS-DOS 7.0, kiu laŭ *Windows magazine* junio 1993,p35 estos: "*Versio 4.0 de Fenestroj minus grafikaj kapabloj, kiu permesas al la komputoranto ordoni kelkopajn DOS-traktadojn*". Sur paĝo 219 en la sama revuo ni povas legi ke *Bill Gates* diris ke "*DOS 7.0 estos la plej granda ŝanĝo, kiu iam okazis en DOS*". Mi opinias, ke

tio estos i.a. la enkonduko de Unikodo. DOS 7.0 probable solvos ĉiujn niajn teknikajn problemojn. La sola por ni ankoraŭ solvinda problemo estas varbi pli da kunlaborantoj, kiuj memstare eklaboru. Tial miaj venontaj paŝoj estos varbado kaj konsilado de novaj kunlaborantoj. La volumoj de Plena Pekoteko 85-90 espereble faciligos tiun varbadon kaj konsiladon, ĉar ili klare montras, kiel Pekoteko funkcias.

En la nuna momento mi kompilas alfabetan indekson de la UDoKo-registraĵoj en PP85-90. Tiu indekso faciligos trovon de UDoKo-numero por novaj nocio-kompleksoj. La unuaj ŝtupoj por generi tiun indekson estis facilaj: Necesis nur forigi el la registraĵoj de la dua volumo la referencojn al Pekoteko-registraĵoj. Tiel mi ricevis registraĵon 92/21, kiun povas mendi ĉiu, kiu ŝatus utiligi UDoKon por klasifi proprajn kolektojn de libroj, artikoloj, sonbendoj. Se iu posedas informojn por kompletigi la tabelojn en specialaj fakoj, mi ĝojus se tiu ĉi povus registri la kompletigojn en la tabelojn. Por ke mi povu generi el tiuj tabelaroj la deziratan alfabetan indekson, necesas ankoraŭ aliaj paŝoj, kiujn mi priskribis en la apendico en la libreto, kiu akompanas la paroladetojn.

La libreto "Novaj Radikoj en la Esperanta Bildvortaro" jam delonge atendas publikigon. La laboro por kompili ĝin ne devus esti granda, ĉar estas eltirendaj el Plena Pekoteko 85-90, nur tiuj nocio-kompleksoj, en kiuj troviĝas terminoj el la Esperanta Bildvortaro. El tiuj nocio-kompleksoj mi devus forigi la klasifajn numerojn, ĉiujn etnolingvajn terminojn, la referencilojn kaj la font-indikajn kampojn kaj la rimarkigo-kampojn. Post tio la kompleksoj estas alfabeto ordigendaj laŭ Esperantaj terminoj, por ke ni ricevu similan verketon kiel la suplemento al PIV. Kontraste al tiu verko troviĝas en ĉiu nocio-komplekso de "Novaj Radikoj" la Pekoteko-numeroj, por ke oni povu facile trovi pliajn informojn, se oni deziras tion. Mi esperas, ke ne plu daŭros longe, ĝis tiu ĉi libreto estos havebla. Tamen iun daton mi ne volas promesi, ĉar kiam mi

antaŭe promesis ion, kutime aliaj taskoj intervenis, kaj la verko ne aperis tiel frue, kiel mi planis.

Sed tiu sperto ne servu al vi kiel preteksto por ne oferti vian kunlaboron. Ne diru: "Ho, tiu ĉi ĉiukaze estas jam tiel okupita, ke mi ne devus proponi al li mian kunlaboron, ĉar tio devigus lin skribi al mi, kaj mi ne volas ŝarĝi lin per ankoraŭ pli da laboro!" Mi volonte investos iom da tempo por helpi al novaj kunlaborantoj efike eklabori sur la terminara kampo. Multaj cirkuleroj por respondi la ĝeneralajn demandojn jam estas pretaj kaj devas nur esti ekspeditaj. En PP85-90 ĉiu trovas respondojn al la plej kutimaj problemoj. Mi tre detale priskribis en cirkulero TC89/2, kiel oni povus helpi traduki la novan version de "*Duden - Bildwörterbuch de deutschen Sprache*."

Taskoj abundas. Por ke vi fariĝu diligenta kunlaboranto nur necesas, ke vi spertu la ĝuon, kiun vi havos, se vi konstatos, ke via termino-propono estas ĝenerale diskonigata, kaj ke oni serioze diskutas pri propono, kiun vi faris, por ke nia lingvo fariĝu pli logika kaj esprim-riĉa. Tial kunlaboru! Eĉ per la novaj teknikaj rimedoj unuopa homo ne povas fari ĉion. Mi ja planis Pekotekon tiel, ke ĉiu kapablu egal-rajte partopreni en tiu ĉi projekto. Se nur mal-multaj Esperantistoj pretas oferi iom de sia tempo, ni ne povos plene utiligi la unikajn ŝancojn, kiujn la moderna tekniko provizas al ni. Same kiel komputoro bezonas homojn por utiligi ties kapablojn, Pekoteko bezonas homojn por akiri rezultojn. Manpleno da homoj jam atingis imponajn rezultojn. Tamen por realigi la projekton de multlingvaj vortaroj sur kompaktaĵoj multe pli da kunlaborantoj estas bezonataj, por ke ni dum malmultaj jaroj povu atingi tiun celon.

*Enhave senŝanĝa represo de la eldono Junio 1993.
La kontakt-adreso ne plu aktualas,
la aŭtoro Rüdiger Eichholz mortis en Aŭgusto 2000.*

*Grava nuntempa terminara projekto estas Reta Vortaro
<http://www.uni-leipzig.de/esperanto/voko/revo/>*

Pri la cirkuleroj de Rüdiger Eichholz kontaktu

Bernhard.Pabst[ĉe]gmx.de
(anstataŭigu [ĉe] per @)

© *por la represo Bernhard Pabst,*
Septembro 2006